der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

23. Jahrgang | Nr. 141 (1/1987) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

100 jaroj de Esperanto

Kiam dum julio 1887 aperis la „Unua libro" de d-ro Esperanto, neniu povis antaŭvidi, kio fariĝos el tiu 40paĝa broŝureto, entenanta nur la bazan regularon (la famaj 16), ĉirkaŭ 900 radikojn kaj kelkajn tekstojn. Hodiaŭ ni scias, ke kvazaŭ antaŭ niaj okuloj el projekto fariĝis vaste funkcianta lingvo, kun diferencita parolantaro, abunda parola kaj skriba uzoj. Sendube la mondo jam identigas la problemon de internacia „helpa" lingvo kun Esperanto.

Kompreneble, laŭ teoria vidpunkto, tiu identigo estas malĝusta. Ja ekzistas preskaŭ 1 000 projektoj kaj inter ili kelkaj kun iom da sukceso. Tamen, vere **lingvo** fariĝis nur Esperanto. Cetere, UNESKO ne akceptis rezolucion, ĉar ĝi volis solvi la la mondan lingvo-problemon. La plej grava internacia kulturpolitika organizaĵo akceptis ĝin, ĉar Esperanto reale kontribuas al la internacia kultura interŝanĝo, ĉar ĝi funkcias. Tiu jubilea jaro certe estas okazo por rerigardi la vojon, kiun faris la adeptoj kun sia lingvo. Oni konstatos multe da sukcesoj kaj multe da malsukcesoj.

Sciencaj atingoj rivalas kun primitivaj diletantaĵoj. Kia estos la estonteco de Esperanto? Nu — tia kia la historia evoluo permesos kaj kia ni mem faros ĝin. Taskoj ne mankos. „Lamentoj" ne utilos. Gravas sole la saĝa ago. Kaj tio i. a. signifas por GDREA:

1. Necesas signife plialtigi la lingvan nivelon de ĉiu unuopa esperantisto. Tio ankaŭ inkludas la kapablon traduki beletrajn kaj fakajn tekstojn.
2. GDREA devas daŭrigi la vojon, konstante montri per taŭgaj rimedoj la praktikan, sciencan, kaj politikan valoron de la funkcianta planlingvo.
3. Ĉiu grupo, ĉiu estraro devas nepre internaciigi sian agadon. Sen internaciaj rilatoj ne nur la alogeco por Esperanto mankos, sed ankaŭ ne eblas plenumi la plej gravan taskon: Kontribui al la internacia popola interkompreniĝo, al malkonstruo de antaŭjuĝoj, por mondvasta dialogo cele al paco kaj malarmado.
4. Kvankam nia asocio neniam preferis kvanton anstataŭ kvalito, ni tamen konsciu, sen pli granda kvanto ne eblas atingi certan kvaliton de nia agado. Nepre necesas plialtigi la nombron de niaj membroj. Sed oni ne varbu sencele kaj senprincipe. Ni aparte devas atingi junajn intelektulojn kaj laboristojn, kiuj pretas engaĝi sin.
5. La tuta kontribuo de GDREA en la internacia Esperanto-movado devas fariĝi pli rimarkebla, pli aktiva. Aparte gravas la plifortigo de la rilatoj al ĉiuj socialismaj landoj.

Kaj pri la jubileo? Ni laboru normale kaj celkonscie. Se ni plialtigos la kvaliton de nia laboro, ni havos dignan kontribuon al la centjariĝo. Kelkaj apartaj „jubileaj" kontribuoj ne mankas.

EDMOND PRIVAT

Esprimo de sentoj en Esperanto

En la jaro 1931 aperis verketo, kiu ĝis hodiaŭ ne multe perdis de sia freŝeco kaj utileco por trafa informado kaj argumentado. Multaj gravaj esperantologiaj faktoj kaj problemoj estas popularstile prezentataj. Ni do volonte represas ĝin en via revueto. La red.

O. Enkonduko

Tiu ĉi verketo ne estas lernolibro. Ĝi ne celas doni konsilojn aŭ regulojn. Ĝi estas nur observa rigardo al la lingvo Esperanto en ĝia nuna viva stato. La kvar unuaj ĉapitroj priskribas la parolan materialon kompare kun tiu de aliaj lingvoj. La sekvantaj ĉapitroj montras, kiamaniere fleksiĝas tiu materialo sub la vigla ludo de la homaj sentoj, kiuj neeviteble postulas kaj trovas kontentigon de siaj esprimbezonoj. Kompreneble tiu studo estas tute ne kompleta kaj fakte prezentas nur ĝeneralan ekvidon super vasta esplorinda kampo. Teknikajn esprimojn de lingvoscienco mi kiom eble evitis intence por faciligi la legadon al ĝenerala publiko ...

Genève, Junio 1930 **Edmont Privat**

1. Studo post kutimo

Komparo kun gepatra lingvo. Historia vidpunkto. Ĝia trouzo. Antaŭjuĝoj. Kiel funkcias lingvo. Konformiĝo al bezonoj. Stato en difinita periodo.

La gepatran lingvon oni scias antaŭ ol oni studas ĝin en lernejo. Esperanton kaj ceterajn fremdajn lingvojn oni plej ofte studas antaŭ ol oni scias ilin. Ĉi tiu verko sin turnas al homoj, kiuj ŝatus agi pri Esperanto simile kiel por gepatra lingvo: studo post kutimo.

Tre interesa fariĝas tia studado, ĉar ekzistas jam bazo por komparo inter almenaŭ du lingvoj inkluzive la gepatra. Ĉiu komparo helpas koni pli bone la eblecojn de ambaŭ kaj samtempe fari al si ekideon pri kelkaj aspektoj de ĝenerala lingvo-scienco.

La historian vidpunkton ni provizore lasos tute flanke. Se ekzemple la leganto estas angla-lingvano, li ja scias, ke la vortradikoj de ambaŭ lingvoj havas ofte la saman historion kaj ĉiam la saman prahistorion, ĉar ambaŭ lingvoj elĉerpis sian materialon el germanaj kaj latinidaj dialektoj devenantaj de antikva hindo-eŭropa fonto. Studante la radikon **du** aŭ **tri** en sanskrita, latina aŭ gota lingvoj, oni studas samtempe parton el historio de Esperantaj **du** kaj **tri** aŭ anglaj **two** kaj **three**. Studante la gramatikan sistemon de tiuj antikvaj paroliloj, oni samtempe studas la devenon de la Esperanta kaj angla, kiuj bazas sur komuna tradicio. Same la rusa hispana, franca aŭ germana.

Ni lasu tion. En la nomo de historio estas ofte diritaj rimarkindaj malspritaĵoj en lingva instruado aŭ en senpripensaj juĝoj de homoj. En la nomo de historio, dum tuta generacio, intelektuloj, kiuj neniam aŭdis eĉ unu frazon en Esperanto, asertis, ke ĝi estas „maŝino senanima" kaj ke ĝia sukceso estus „grava danĝero por la civilizacio".

Ĉar la fundamentaj elementoj en Esperanto estis iom orde elektitaj kaj klare kunmetitaj de genia Eŭropano scianta multajn lingvojn, ili supozis, ke la rezultato devas esti barbara fabrikita miksaĵo. Dume la fundamentaj elementoj de ilia lingvo — plej parencaj — estis senorde elektitaj kaj malklare miksitaj de barbaraj homoj, nesciantaj eĉ legi kaj ripetantaj esprimojn aŭditajn de senkulturaj gepatroj aŭ batalintaj malamikoj. En la nomo de tiu diferenco ili juĝis.

Tio estas aspekto de la historia vidpunkto. Ĝi similas la sintenon de nobelo, kies prapatro estis siatempe ĉefrabisto regiona. Li malŝate rigardas al juna poeto, kies patro modeste vendas legomojn.

Por juĝi la valoron de tiuj du homoj — ambaŭ nepoj de Adamo —, ni ne rigardu nur la arkivojn de la vilaĝo, sed antaŭ ĉio ilian nunan konduton, scion kaj utilon al komunumo.

Ni lasu do la historian disputon pri nobeltitoloj laŭ deveno, aĝo, socia rango ktp. kaj rigardu tute simple la koncernajn lingvojn en ilia nuna stato, kvazaŭ ni scius nenion pri ilia deveno

. . . ekzemple kiel azia aŭ afrika junulo lerninta anglan kaj Esperantan lingvojn dum restado en iu haveno.
Ni ekzamenu, kiel funkcias la parolilo, kiel ĝi plenumas sian rolon, kiel ĝi kapablas esprimi niajn pensojn kaj sentojn, kiel ĝi sukcesas ilin komprenigi al ceteraj homoj. Kiam ni plene konos ĉiujn ekzistantajn rimedojn de la lingvo, tiam ni povos, se ni tion ankoraŭ deziras, amuziĝi je juĝo post komparo kaj ludi je tiu festa disdonado de kvalitaj adjektivoj: riĉa, malriĉa, klara, malklara, anima, senanima ktp. Ankaŭ tiam ni povos mem konstati, ĉu la faktoj konfirmas, ĉu malkonfirmas tiun rimarkindan supozon, ke miloj da homoj, kutimantaj uzi riĉajn kaj delikatajn kulturlingvojn en sia nacia vivo, povis por siaj internaciaj rilatoj en kunvenoj, vizitoj, korespondado, verkado, aŭ eĉ foje en dugentaj hejmoj, kontentiĝi je „senanima maŝino" aŭ „barbara fabrikaĵo sen ia ajn esprima povo".
La esprimbezonoj de la homa animo ne ŝanĝiĝas laŭ la ilo uzata. Ili restas konstante samaj kaj kreskas kun la kulturo. Estis do multe pli racie supozi, ke tiuj bezonoj nepre devigis donitajn rimedojn altiĝi al plena kontentigo de siaj postuloj . . . sed ni vidu la faktojn mem.
Esperanto prezentas al lingvistoj interesan okazon kontroli plurajn hipotezojn. Eĉ se nur pro tio, ĝi devus ilin allogi kiel observinda fenomeno. Ĝin ni provos nun studi antaŭ ĉio **state.**

2. Priskribo de la lingvo

La sonoj. La ritmo. Valoro de la signoj. Sono kaj rolo. Finaĵoj. Frazordo. Egalvaloraĵoj. Interpenetro de vortaro kaj gramatiko. Afiksoj. Vivantaj kaj ŝtoniĝintaj. Komparo kun francaj sufiksoj.

Laŭsone Esperanto similas la plej sudajn latinidajn lingvojn: italan, provencalan, hispanan, sed ĝi ne konas duoblajn konsonantojn samajn. Kiel la ĵus menciitaj lingvoj, ĝiaj vortoj ofte finiĝas per vokalo neakcentita. Je vokaloj ĝi estas modesta, kiel la itala lingvo. Krom **a, e, i, o, u** estas aŭdeblaj diftongoj **oj** kiel en rusa, **aj** kiel en germana (**mein, sein, dein** ktp.) kaj **aŭ** kiel angle (**mouse, house** ktp.). **Eŭ** estas malofta.
Aliaj vokaloj kiel nazaj **an, in, un, on** aŭ fermita **u (ü)** de la franca lingvo tute forestas. Same la diversaj specoj de fermitaj kaj malfermitaj **a, e, o,** kaj la multnombraj diftongemaj „glitvokaloj" svarmantaj en la angla lingvo tute forestas el Esperanto.

Simile kiel en japana lingvo, konsonantoj plej oftaj estas l, k, t. Pli malofta estas s. Iom frapas germanajn kaj francajn orelojn la uzo de duopaj konsonantoj ĉ kaj ĝ, kiujn kutimas angloj kaj slavoj.

La ritmon de la lingvo regas regula kaj forta akcento ĉiam sur antaŭlasta silabo de l' vortoj, kiel kutimas poloj. Plej multaj vortoj estas du aŭ trisilabaj. Pli malmultaj estas unusilabaj (nur prepozicioj, konjunkcioj, artikolo, ciferoj aŭ personaj pronomoj). Ili ĝenerale kunsonas kun la sekvanta vorto **(mihavas, laknabo, delvorto, ĉetablo),** escepte **kaj,** kies senco estas kunliga, sed kies evidenta kroma rolo estas frape soni inter vortoj aŭ frazoj aparte kaj apartige.

Kiel ĉiu alia lingvo, Esperanto konsistas el sonaj signoj por la diversaj ideoj. Kiam unu ne sufiĉas, pluraj signoj kune aŭ apude elvokas la intencitan ideon.
La diversaj specoj de signoj aŭ vortoj estas similaj en ĉiu hindo-eŭropa lingvo. Oni klasigas ilin laŭ ilia plej kutima rolo. En Esperanto la sameco de rolo kuniras kun simileco de formo t. e. kun samsona finaĵo.
Ekzemple la nomoj de konkretaj objektoj, bestoj, homoj aŭ abstraktaj aferoj estas vortoj finiĝantaj kun -o. Kvalitojn de tiuj objektoj oni povas aldone montri per vortoj finiĝantaj kun -a. Agojn aŭ statojn oni priskribas per vortoj kun **as, -is, -os** laŭ la tempo, kiam ili okazas, okazis, aŭ okazos. Kvalitojn de tiuj agoj oni povas montri per aldonaj vortoj kun -e.
Tio estas la ĉefa diferenco inter Esperanto kaj gepatra lingvo. En tiu ĉi lasta, tiuj helpaj finaĵoj tute mankas aŭ male ili tiom multnombras kaj diversas interne de ĉiu speco aŭ samsonas kun tiuj de alia speco, ke ili konfuzigas anstataŭ helpi. Sole ĉe adverboj, en franca kaj angla lingvoj, la konataj sufiksoj **-ment** kaj **-ly** atingas grandan oftecon, se ne absolutan ĉiufojecon.
Ke tiuj rolmontraj finaĵoj ne estas

nepre necesaj, tion pruvas la fakto, ke lingvoj povas ekzisti kaj funkcii sen ili. Sed ni tuj vidos la koston.

Ekzemple la germana lingvo ne posedas adverban signon. Iu ajn simpla adjektivo servas por kvalitumi aferon aŭ agon, kvazaŭ ni dirus: **li kantas bel'** aŭ **mi konas bel' kanton.**

Simile afrikanoj balbutantaj anglan aŭ francan lingvon diras tute trankvile **chanter beau** aŭ **sing beautiful.** Tio neniel rilatas al diferenco de civilizo, sed tute simple ilustras leĝon de neceso kaj sufiĉo.

Prenu frazon el nuraj radikoj, kiel **jun knab renkont hieraŭ malriĉ hom sur pont apud vilaĝ.** Ĝi estas komprenebla, kondiĉe, ke la vortoj sekvu sisteman ordon.

En iu ajn lingvo necesas ĉu konvencia loko, ĉu konvencia formo, kiel signo de la rolo. Tio aperas plej klare ĉe la diferencigo inter aŭtoro kaj suferanto de iu ago.

Kat manĝ mus hieraŭ estas tute klara, sed **mus hieraŭ manĝ kat** lasas dubon, ĉar mankas tie ambaŭ ordo kaj signoj. Unu el ambaŭ devas ekzisti. Angla kaj franca lingvoj montras la suferanton de l' ago per ordo: **post la aga vorto** (verbo). Germana kaj Esperanto per signo (n):

kato manĝis la fiŝon
la fiŝon manĝis kato

Ambaŭ estas klaraj. Uzante por tiu celo la forman signon kaj ne la ordon, Esperanto ŝparas do tiun lastan rimedon kaj povas ĝin utiligi por alia celo: insisto pri tiu aŭ alia ideo. La du supre cititaj frazetoj entenas senteblan diferencon „koloran" en la senco. Tian diferencon angla aŭ franca lingvo povus traduki nur per aldono de pluraj pliaj vortoj laŭ modelo:

Estas kato, kiu manĝis la fiŝon.

Akuzativan signon la franca lingvo konservis ĉe la pronomoj kaj tiam guŝte renversas sian kutiman ordon:

je me redarde	**mi min rigardas**
qui, que	**kiu, kiun**
soi, se	**si, sin**
il, le	**li, lin**
tu, te	**vi, vin**
elle, la	**ŝi, ŝin**
ils, les	**li, ilin**

Esperanto uzas unikan signon j por montri multnombrecon ĉe objektoj. Tiu signo etendiĝas al la kvalitaj vortoj aldoneblaj. Ankaŭ tia signo ne estas necesa. La franca parolata lingvo apenaŭ konas ĝin, sed tiam ĝi bezonas ĉiam artikolon aŭ ciferon antaŭ nomoj de objektoj. Ĉar **tabl (table, tables)** havas tute saman sonon (ne skribon) multnombre aŭ ne, la franca lingvo bezonas kvar artikolojn **la, les, une, des,** por diferencigi **la tablo, la tabloj, tablo, tabloj;** dume la angla lingvo havas preskaŭ la saman sistemon kiel Esperanto (ĉe numeroj 1, 2 kaj 4):

1. **the table;** 2. **the tables;** 3. **a table;** 4. **tables.**

Sed la angla lingvo ne uzas sian signon de plureco (s) ĉe la kvalitaj vortoj (adjektivoj). Ĝi lasas ilin ĉiam senŝanĝaj. Denove tion devas kompensi ordo. Se ni dirus kiel anglo **blank ĉevaloj,** tiam **blank** devus ĉiam resti ĉe ĉevaloj. La fakto, ke Esperanto diras tie **blankaj,** ebligas liberecon uzi la distingilon ordan por alia celo.

En lingvoj, kiel ĉe aliaj temoj, multo estas afero de kompensado.

Latina lingvo riĉe konjugadis la verbojn:

laudo	**mi laŭdas**
laudas	**ci laŭdas**
laudat	**li laŭdas**
laudamus	**ni laŭdas**
laudatis	**vi laŭdas**
laudant	**ili laŭdas**
laudavi	**mi laŭdis**
laudavisti	**ci laŭdis**
laudavit	**li laŭdis**
laudavimus	**ni laŭdis ktp.**

Esperanto uzas nur unu saman finaĵon por ĉiuj personoj ĉe la sama tempo, sed kompense ĝi nepre devas montri la personon almetante la pronomon aŭ nomon de l' aganto antaŭ la verbon. Al oreloj la formo ne sonas **laŭdas** aŭ **laŭdis,** sed **milaŭdas** aŭ **milaŭdis, vilaŭdas, vilaŭdis** ktp.

Nia supozita afrika junulo rajtus diri, ke, ĉe verboj en Esperanto, la tempon montras finaĵo kaj la personon prefikso. En lingvoj, kiel franca kaj germana, la personon montras ambaŭ finaĵo kaj „prefikso" tute superflue:

il loue **er lobt**
nous louons **wir loben**
vous louez **ihr lobet**

kaj la finaĵoj tiom diversas kun tempoj, modoj, specoj da verboj ktp., ke tio ŝarĝas la memoron per centoj kaj eĉ miloj da formoj.

Certe la ĉefa tipa karaktero de Esperanto estas la fakto, ke vortaro kaj gramatiko tiom interpenetras unu la alian, ke ili fariĝas nedisigeblaj. Studo de vortaro sola povas aplikiĝi nur al radikoj, kaj tiujn oni ne renkontas nudaj en la parolata lingvo. Nur foje en poezio aperas senvestaj **kor'** aŭ **ĉiel'** kaj eĉ tiam la forta akcento sentigas, ke temas tie pri intencita elizio. Nur la malgrandaj vortetoj kontentiĝas je sia loko en la frazo por montri eĉ senveste sian utilon. Ĉiuj ceteraj aperas senescepte vestitaj per kolora signalvosto.

Tiuj signalvortoj — ĉiam neakcentitaj en la parolo — havas du efikojn en la kompreno: unu (gramatika) montrante rolon de la vorto kaj unu sona (fonetika) helpante la orelon ripozi inter du pli gravaj silaboj kaj lasante paŭzeton por plene enkapti unu vorton antaŭ atenti pri la sekvanta.

Estis ofte konstatite, ekzemple en radio-aŭdado, kiam oreloj devas iom peni, ke lingvoj kun finaĵoj kiel itala aŭ Esperanto pli klare kompreniĝas ol lingvoj kiel la angla, kie monosilabaj radikoj rapide sekvas unu la alian. Komparu: **Juna knabo vidis grandan domon** kun

Jun knab vid grand dom
A young boy saw a large house

La saman rezultaton atingas kompreneble angla parolanto, kiu zorge haltus inter vortoj, sed tio ne estus natura. Finaĵoj tion devigas germane aŭ itale.

Kiel gramatiko penetras vortaron plej profunde? Per la prefiksoj kaj sufiksoj. La sufiksa vivo en Esperanto estas ĝia speciala kaj aparta eco plej karakteriza.

En alia latinida lingvo la sufiksoj mor**tis**, almenaŭ preskaŭ ĉiuj. Ilin oni studas nur historie por klarigi devenon de vortoj. Ili utilas por etimologio, ne por natura esprima kreado. Tie kuŝas la funda diferenco inter la franca kaj Esperanta lingvoj.

En ambaŭ lingvoj la granda plimulto de la vortaro konsistas el radikoj kun sufiksoj, sed la francaj vortoj fariĝis unuecaj tutoj, dume la Esperantaj estas konstantaj kreaĵoj, kie la diversaj elementoj ankoraŭ sentiĝas aparte. Kiam ni diras Esperante **ridinda,** ni ankoraŭ kreas ĉiufoje kvazaŭ kunmetitan vorton **rid-merita** aŭ frazeron **inda-je-rido.** Dume la Francoj diras **ridicule** unupense tute kiel ili dirus **étrange** aŭ kiel ni dirus **stranga.** Ili neniel pensas pri radiko **rid'** kaj sufiksoj **-ik'** kaj **-ule.** Por ili la esprimo **ridicule** estas unubloka etiketo tute same kiel nia **stranga.**

Multajn tiajn vortojn ili heredis aŭ prunteprenis el latina lingvo jam kun la sufiksoj kaj tute ne konscie pri ili. Similie Esperanto prunteprenis **doktoro** kaj **fromaĝo** kaj tute ne konscias pri **dokt** kaj **or** aŭ pri **from** kaj **aĵ.** Ankaŭ en franca lingvo ekzistas multegaj memformaĵoj ŝtoniĝintaj post longa uzo. Ankaŭ Esperanto jam konas tiajn. Ni ja ne plu pensas je miro, kiam ni diras **mirinda,** simile kiel ni diras **bela.**

Tamen, eĉ inter ŝtoniĝintaj vortoj (kun sufiksoj) de franca kaj Esperanta lingvoj, restas ankoraŭ granda diferenco rilate al memorigo kaj kompreno. La sufikso mem restas vivanta en Esperanto, preta reĝi unuece super novaj generacioj de naskotoj samkiel sur la malnovaj statuoj. La vivo konservas al ĉiu Esperanta sufikso ĝian propran sencon, tiom pli, ke ĝi restas ankaŭ vivanta kiel aparta vorto (**inda, eta, eco** ktp.).

Dume en franca lingvo unu sufikso reprezentas foje unu, foje alian, eĉ trian aŭ kvaran ideon. Renverse sama ideo reprezentiĝas per tri aŭ kvar sufiksoj. Ekzemple:

eur		
moqueur	**signifas mokema**	**1.**
grandeur	**signifas grandeco**	**2.**
instituteur	**signifas instruisto**	**3.**
age		
plumage	**signifas plumaro**	**1.**
laitage	**signifas laktaĵo**	**2.**
ramage	**signifas pepado**	**3.**

esse	
une gentillesse	signifas ĝentilajo 1.
la gentillesse	signifas ĝentileco 2.
doctoresse	signifas doktorino 3. eco
1. grandeur	signifas grandeco
2. gentillesse	signifas ĝentileco
3. rapidité	signifas rapideco
4. esclavage	signifas sklaveco

La varieco de sufiksoj en franca lingvo ne estas pli granda ol en Esperanto, (En tiu ĉi listo aperas por sep ideoj kvin francaj kaj sep Esperantaj sufiksoj.) Sed la malkonstanteco forprenas fortecon de la sufiksoj kaj malriĉigas ilian esprimpovon, faciligante la ŝtoniĝon.

3. Reagoj el ekstero

Pruntoj el ekstero. Komparo kun du akvujoj. Asimila potenco. Eksteraj afiksoj. „Administracio" kaj Administrejo". Isto kaj isto. Interna sistemeco. Batalo kun „internacieco". „Interkonsento" kaj „konvencio".

Ke vortaro kaj gramatiko estas profunde interpenetritaj en Esperanto, tion montras ankaŭ la reagoj de l' ekstero. Pli ol iu alia lingvo, Esperanto prunteprenis el ekstero dum mallonga periodo tempa. Aperinte kun malgrandega vortaro, ĝi devis, pro la bezonoj de l' uzado, egaliĝi al kapableco de l' najbaroj vole, nevole. Tio estas fakto almenaŭ por la komuna lingvo kaj por tiuj el la kampoj teknikaj, kie Esperanto jam servas. En kelkaj aliaj kampoj teknikaj la enfluo ankoraŭ ne okazis, ĉar la uzo mankas.

Imagu akvujon novan kun iom da akvo kaj kelkaj fiŝoj. Metu ĝin inter plurajn aliajn akvujojn plenajn je akvo kun multego da fiŝoj kaj malfermu kontakton inter ĉiuj per tuboj.

Kio okazos? En la malpli plenan tuj enfluos amase akvo kaj fiŝoj ĝis samalteco de la nivelo ĉie. Pri la aliaj sekvoj, intermanĝado, naskado ktp. de la fiŝoj vi mem imagu.

Sufiĉe simila montriĝis la situacio de Esperanto inter naciaj lingvoj. Ĝenerale ĝi sufiĉe firme rezistis kaj konservis sian ordeman karakteron eĉ dum kaj post la enfluo. La unueciga potenco de la medio efikis iom simile kiel en Usono ĉe la enmigrinta loĝantaro. Tamen interesaj influoj estas observindaj.

Ekzemple enfluis certa kvanto da internaciaj vortoj kun sufiksoj ne Esperantaj, kiel **redakcio, evolucio, administracio, redaktoro, direktoro.** Ankoraŭ nun ili batalas kun aŭtentikaj Esperantaj formoj **redaktejo, evoluo, administrejo, redaktisto, direktisto,** kaj fakte vivas apude en lingvo. Kiu venkos en tiu konkurenco? Laŭ observo de la nunaj faktoj ŝajnas, ke pli sukcesas ĝenerale la Esperanta formo, se ĝia senco estas plenegala kun la fremda, ekz. **evoluo = evolucio, civilizo = civilizacio,** sed kiam la senco estas iom malsama, la lingvo emas konservi ambaŭ por riĉigi siajn eblecojn de esprimado.

Administracio estas oportuna vorto por kovri ejon kaj aron da homoj, anoniman tuton de administrantaro en administrejo, kiun oni povu kulpigi pri multaj eraroj aŭ krimoj ne akuzante iun apartan personon. Same pri **redakcio. Redaktoro** estas funkcio, kiun povas plenumi okaza redaktanto aŭ profesia redaktisto. Same estis pri **prezidento**[2]**),** kiu tamen preskaŭ malaperis sub la premo de la aŭtentika Esperanta formo **prezidanto,** malgraŭ la avantaĝoj konservi la eblecon uzi la adjektivon **prezidenta** (palaco aŭ dekreto).

Interesa estas la ekstera internacia influo ĉe **-ist.** En Esperanto tiu sufikso primitive montris profesion, sed la fremda ondo envenigis amason da internaciaj nomoj, kiel **socialisto, kalvinisto** ktp. Pro analogio oni baldaŭ diris **Esperantisto, Beaufrontisto**[3]**)** ktp.. La sufikso ricevis duan vivantan sencon, iom similan al tiu de **-ano,** ĉar oni ja diras ankoraŭ **Luter-ano, kristano,** ne nur laŭ fundamenta reguleco, sed ankaŭ pro analogio kun eksteraj vortoj **Lutherans, Luthériens, Christians, Chrétiens.**

Similajo okazas ĉe landnomoj. Tiuj en malnovaj kontinentoj estas formitaj el gentnomo kun sufikso **-ujo** (Italo, Italujo, Perso, Persujo). Dume tiuj en novaj landoj de Ameriko kaj Aŭstralio aperas male kiel geografiaj internaciaj nomoj Kanado, Kolombio, Bolivio. Ĉar ne ekzistas tie nacia gento, la loĝantojn oni nomas simple per aldono de

la sufikso -an same kiel urbaj aŭ kontinentaj nomoj **Parizano, Aŭstraliano, Kolombiano.**

La fakto, ke tiom multaj el tiaj nomoj finiĝas per **-io,** instigis analogie uzi **Italio, Persio,** ankaŭ sub influo de eksteraj internaciaj formoj **Italie, Italien, Persia, Persien** ktp. Kaj **-io** eĉ emis enkondukiĝi en la lingvon kiel geografia sufikso oficialaj aŭtoritatoj.[4]) Se ĝi sukcesus, tiam eble ĉiuj landnomoj iam unuformiĝus eĉ kontraŭ la internacieco, ĉar en laboristaj gazetoj oni vidis eĉ **Kanadio, Meksikio** (uzita de Zamenhof por distingi la landon de la ĉefurbo), kiuj estas tute ne internaciaj kaj eĉ iom monstraj. Rimarkinda estas en Esperanto la ĉiutaga batalo inter la interna sistemeco, ema al unuecigo kaj la ekstera „internacieco" malpli regula. La interna unueciga forto estas tiel granda, ke reguleco rekreiĝas el malreguleco por konformiĝi al la interna medio.

Ĉar multaj vortoj eniris la lingvon kiel **transformismo, kalvinismo** ktp., **-ismo** fariĝis vivanta sufikso kaj libere uziĝas. La batalo inter eksteraj kaj internaj fortoj estas la ĉiutaga vivado de Esperanto. Por ĉiu nova bezono de la lingvo ekzistas ĉiam du eblecoj: ĉu formi vorton el propra fonto, ĉu prunti el ekstero. Kiam ekzistas tre internacia formo, jam konata de multaj nacioj, kiel **telefon** aŭ **telegraf,** la vorto kompreneble ĝeneraliĝis rapide kaj eĉ ne lasis tempon al iu provaĵo kiel germana **Fernsprecher** (malproksimparolilo), sed kiam internacia vorto ne ekzistas aŭ kiam ĝi estas internacia nur laŭforme, sed ne laŭsence, la propra Esperantaĵo venkas la batalon. **Interkonsento** estas pli sukcesa ol **konvencio,** ĉar ĝi garantias pli da sekureco ol vorto, kiu signifas en aliaj lingvoj tro da malsamaj aferoj: kongreso, moro, dokumento ktp.

Ankaŭ la ofteco ludas sian rolon. Se temas pri vorto ne tiom ofte uzata kiel **kiropedist'** aŭ **veterinar',** esprimo **piedflegisto** aŭ **bestokuracisto** multe pli sukcesas. La leĝo de la malpli granda peno efikas tie.

4. Ecoj karakterizaj

Priskribemo. Etiketoj. Germana kaj franca. Konstruado propra kaj kopiema. Kreo kaj difinemo. Juneco. Konfuzo kun artefariteco. Libereco. Travidebleco. Chaucer kaj Rabelais. Analogio kaj reguleco.

Cetere Esperanto estas priskribema lingvo, kiel la germana, kaj ne etiketa, kiel la franca. Tio parte devenas de la fakto, ke nur malmultaj homoj ofte kaj kutime parolas ĝin. La memoro retenas nur la ofte uzatajn vortojn. Kiam venas tempo paroli, la maloftaĵoj ne alsaltas laŭdezire al lipoj. Tiam, anstataŭ halti kaj serĉadi en tirkestoj, la parolanto trovas pli rapide eblecon fari mem vorton por priskribi la ideon aŭ la senton. Eĉ se li forgesis la vortojn **plumo, krajono, kulero** aŭ **forko,** li ĉiam povas komprenigi sin per **skribilo** kaj **manĝilo** (ilo por skribi, ilo por manĝi).

Katedralo estas tre taŭga vorto, sed **ĉefpreĝejo** certigas eĉ pli akuratan komprenon ĉie. Nun prenu vorton, kiel france **susceptible,** angle **sensitive** aŭ germane **empfindlich.** Por certigi seneraran komprenon, Esperanto ne kontentiĝas je **sentema,** sed priskribas iom detale **ofendsentema.** Tiuj priskribaĵoj ekzistas amase en Esperanto: **jetfermi, mortfrapi, birdfluge** ktp.

Kelkaj estas originalaj, kelkaj estas interesaj kombinaĵoj el memformado kaj ekstera internacieco, ne sona, sed konstrua. Vidu **mirinda** kiel traduk-valora egalaĵo de **wunderbar, wonderful, merveilleux.** En sama kategorio observu **sentaŭgulo, akvofalo, suboficiro, terpomo.**

Same kiel Esperanto ŝuldas sian fundamentan vortaron al latina kaj germana fontoj, same ĝi esprimas ideojn laŭ la etiketa metodo (latina) kaj laŭ la priskriba maniero (german-slava). Inter la radikoj forte regas la romana elemento, sed en la tuta vivanta lingvo parolata certe regas, ne la etiketa tradicio, kiel en franca lingvo, sed multe pli la priskriba, kiel en la germana.

Kiu parolas france, tiu serĉas en abunda kaj riĉa tirkestaro la ĝustan etiketon por ideo. Lia scio de la lingvo mezuriĝos je lia kapablo memori kaj elekti „ĉiam la ĝustan vorton", kiu kovras la ideon tiel severe, kiel la latina surskribaĵo sur ĉiu botelo de l' apotekisto. El tio la famo de la franca lingvo pri „klareco" — kvazaŭ kodo — kaj

ankaŭ ĝia karaktero de lingvo mortfiksita, finplena, definitiva.

Kiu parolas Esperante, tiu kreas grandan parton de siaj esprimoj uzante libere la ekzistantajn rimedojn kaj interalie la vivantajn sufiksojn kaj prefiksojn. Li penas malpli memori kaj elekti ol krei kaj priskribi. La lingvo estas ankoraŭ juna. Ankaŭ ĝi malpli rapide eluziĝas ol naciaj lingvoj ĉiutage parolataj. La libereco estas ankaŭ multe pli granda ol en ili kaj kompensas la malpli riĉan sperton. La proporcio de persona stampo sur la parolo estas pli notinda kaj la ripetado malpli absolute reganta. La personeco de l' parolanto aperas pli ol lia nacieco. Tiu priskriba libereco donas al la lingvo travideblecon, kiu ĝin igas aparte taŭga kiel tradukilo, ebligante alformiĝon pli proksiman al originala teksto ol tion kapablus pli rigida lingvo.

Mulflanke Esperanto similas anglan aŭ francan lingvon en la tempo de ilia juneco. Komparu ĝin ekzemple kun la lingvo de Chaucer aŭ Rabelais. Vi trovos tiun saman flekseblon kaj liberecon en uzado, kreado aŭ elektado de plej trafaj esprimoj. Ĉe la franca lingvo de Rabelais vi sentas ĉiufraze la viglecon de la sufiksoj, ankoraŭ plene vivantaj. Se vi ĝin komparos kun la hodiaŭa franca lingvo, vi trovos multajn samajn diferencojn kiel inter Esperanto kaj tiu ĉi lasta.

Komparante Esperanton kun nacia lingvo suprajaj eksteruloj kalkulas ĉiujn diferencojn al konto de „vivanteco" por unu kaj „artefariteco" por la alia. Ĝi estas grandega eraro. La plej gravaj diferencoj estas ŝuldataj al „maljuneco" kaj „juneco",kio estas tute alia afero.

Ke vi devas diri france **navals** kaj **fatals** multnombre anstataŭ **navaux** kaj **fataux,** kiel vin instigas premanta analogio, sendube tiu fakto estas „natura", se vi nomas naturo la nuran imitadon de malnova tradicio. Male la senescepta regulo de Esperantaj multnombroj estas „artefarita", ĉar tiun tradicion antaŭvidis kaj eĉ antaŭdecidis Dro Zamenhof. Tamen estas nediskutebla fakto, ke plej multaj francoj sentas tute malnaturan lernejan devigon dirante **fatals** kaj **navals** kontraŭ sia emo analogia, kiu instigus ilin diri tute trankvile **fataúx** kaj **navaux** kiel **royaux** kaj **impériaux.** Necesas haltiga remomoro pri instruo aŭ puno en lernejo. Dume nenio estas pli natura por esperantistoj ol diri senescepte **fatalaj, reĝaj, imperiaj** laŭ konstanta kaj senĝena analogio, jam de longe fariĝinta senpripensa kutimo.

5. Esprimaj rimedoj

Sentoj kaj ideoj. Logiko kaj pasio. Esprimiloj. Sona plilaŭtigo. Aliordigo. Ripeto, forigo, aldono. Kreo aŭ modifo. Logiko kaj Analogio. Eg' kaj aĉ'. La vera bazo de reguleco. Senco subjektiva kaj objektiva. Valora kaj estetika juĝo. El' de Profesoro Christaller.

Estas konate, ke ĉiu lingvo servas por esprimi sentojn kaj ideojn, plej ofte ambaŭ kune. Jen ekzemple du frazoj:

A) Ŝi eliris el la vendejo je la deka. Mi estis atendinta ŝin ekstere de la naŭa kaj duono. La pluvo tre malsekigis min.

B) Finfine ŝi aperis el tiu butikaĉo! Horojn mi atendegis sub pluvo kaj estis dronigita ĝis ĉemizo!

La unua frazo (A) estas tipo de lingvo intelekta, logika, akurata, senpasia, simpla komuniko de faktoj, kiel oni postulas de enketa juĝisto aŭ honesta protokolanto. La dua (B) estas tipo de lingvo senta, pasia, intencanta malpli la komunikon de la faktoj ol la samtempan nereteneblan esprimon de forta malkontenteco kaj bezonon kompatigi aŭ indignigi la aŭdanton. Komparante ambaŭ frazojn aŭskulte, kiel ili sonas al orelo, vi baldaŭ observos, kiujn rimedojn oni uzas por ion esprimi (krom komuniki). Ni disponas jenon:

1e: **Sona plilaŭtigo de iu aŭ alia frazero.** Rediru la simplan frazon A, sed plilaŭtigante la vorton **„deka"**, jam tuj vi ricevos iom da sango kaj sento en tiun simplan aserton.

2: **Aranĝo de la frazo en iu aŭ alia ordo.** Metu la esprimon **„je la deka"** je la komenco de la frazo. Ankaŭ tiel vi ricevas ioman diferencon favoran al sentesprimo. Aldonante la sonan plilaŭtigon, la diferenco estas tre sentebla.

3: **Ripeto aŭ forigo de vortoj.** Diru **„mi atendis, mi atendis, mi atendis"**. Tuj oni sentos kompaton al vi kaj simpatios

kun via sufero trafe esprimita. Forigo de vortoj ankaŭ efikas: „Dek minutoj, kvaronhoro, duonhoro. Fine ŝi!" La verbo malaperis, sed la sento kreskis. Se vi klopodas esprimi vian surprizon pri tio, ke sinjoro X. fariĝis ministro kaj vian konvinkon, ke li estas nekapabla por tiu posteno, aŭdu, kiel efikas radikala ŝparo de vortoj: „Li? Ministro? Nu!"; kompreneble aldono de vortoj — same kiel forigo — estas ankaŭ esprimrimedo, kvankam ne ĉiam la plej potenca: „Li? Ministro? Tia azeno? Nu, la respubliko havos belan kapon" ktp.

Jen tri konstantaj rimedoj por esprimi sentojn. Kiel vi mem rimarkis, ili estas nerektaj rimedoj, t.e. ili ne kuŝas en la vortoj mem, sed nur en ilia elparolo aŭ arangxo.

Nun venas la **rektaj** rimedoj troveblaj en la vortoj mem:

4e: **Elekto inter ekzistantaj vortoj.** Dirante „Je la deka ŝi eliris" kun pli forta akcento sur „deka", vi esprimis senton samtempe kun akurata konstato. Se vi preferis elekti la vorton „Finfine" anstataŭ „je la deka", tio montras, ke via indigno pri la longa atendado estis pli forta ol via deziro akurate informi. La ĝustan informon vi oferis al la impresa ekkrio.

Simile, dirante „horojn mi atendis", vi ne nur oferas la precizecon, sed eĉ la veron, ĉar fakte vi atendis nur duonhoron, sed tiuj 30 minutoj ŝajnis al vi horoj kaj tion vi sentas kaj emas sentigi al via aŭdanto. Tiu mensogo estas nur speco de trograndigo, unu el la oftaj formoj de sentesprimo. Ĝi ne estas profunde pli mensoga ol multaj koloroj kaj linioj de artisto, kiu vidas la naturon alia ol fotografilo. Same pri „dronigita" aŭ „malseka ĝis ĉemizo".

5e: **Kreo aŭ modifo de vortoj.** Tiu ĉi paragrafo estu ja nur aldono al la kvara. Via varma malkontenteco ne lasas vin aludi al la magazeno, (kie restadis la sinjorino) sub trankvila tekika nomo. Brule necesas ankaŭ ĝin insulti pro indigno. Estas juko, nepra bezono. Vi do nature elektos **butiko** anstataŭ **vendejo**, ĉar jam pli senvaloriga. Sed tie helpas vin la krea ebleco en la lingvo. **Butiko** ne sufiĉas. Devas esti **butikaĉo**. Oportuna sufikso **-aĉ**, kvazaŭ aldonebla kraĉo, taŭgas por esprimi la furiozan senton kontraŭ la kulpa loko.

Simile pri „atendegis". Se vi diras „mi atendis longe", eĉ „tre longe", neniu sento vibras tie. Ĝi estas tro logika, tro intelekta. Sed **atendegi** almenaŭ sonas iom forte. La pligrandiga sufikso **-eg** frapas tie pro neatenditeco. Ĝi respondas al via bezono pri trograndigo kaj disponiĝas tre oportune.

Nu, bonvolu observi tamen unu diferencon inter **-aĉ** kaj **-eg** uzataj tie, kiel tre vivantaj esprimiloj de sento. Kiam vi diras, ke vi „atendegis" aŭ ripročas vian filon pri „erarego", iom da logiko restas en la uzo. Kvankam la ĉefa eg'-eco sendube brulas en via propra koro, tamen iom da ĝi efektive kaj fakte apartenas al la longa atendado aŭ granda eraro. Sed kiam la plej bonan magazenon en la urbo vi kolere nomis „butikaĉo" nur pro momenta persona kaŭzo, tiam absolute neniom da logiko restas en tia uzo. La aĉ'eco fakte kuŝas nur ĉe vi, en la pasia koloro ombrumanta, pro pure persona kaj momenta kaŭzo, vian rigardon al tiu respektinda vendejo.

„Nu", ekkrios severa leganto, „tiam vi ne rajtas uzi la sufikson. La lingvo devas esti logika." Se tiel estus, ho kara severulo, tiam la lingvo estus plene mortinta, seka kiel ŝtona skeleto kaj juste meritanta ĉiujn eksterajn antaŭjuĝojn pri „artefariteco". Eĉ pli. Neniu povus ĝin paroli, ĉar neniu estas logika. Vi ja mem ofte diras, ke virinoj ne estas logikaj. Estu modesta: la homo — inkluzive viroj — ne estas logika besto. Ĝin regas, ne la logiko, sed la sentoj. Lingvo nekapabla ilin esprimi ne estus lingvo, sed matematiko.

Nu, je kio do utilas la granda reguleco de Esperanto? Sur kio ĝi bazas, se ne sur logiko? La respondo estas klara: la reguleco estas granda faciligo al libera uzo de la lingvo, sed ĝi bazas ne tiom sur logiko, kiom sur **analogio**, natura emo de la memoro al malpli da laboro, t.e. al tuja trovo de la samaj formoj en la samaj cirkonstancoj.

Rigardu bone la aferon pri „butikaĉo". Tre ofte **-aĉ** havas sencon faktan, teknikan, do logikan, se vi volas. Tiun econ vi kredeble konsentos al ĝi en la

vorto „butikaĉo" signifanta de ĉiuj konatan malbonan, etan, mizeran butikon en iu ekstera kvartalo de l' urbo. Same pri „veturilaĉo" signifanta malnovan, difektitan ĉaron forlasitan en iu angulo de vilaĝo kaj sole disponeblan post invado de armeo kaj rabado de ĉiuj aŭtomobiloj kaj taŭgaj veturiloj.
Tamen pripensu momente. Tiuj samaj butikaĉo kaj veturilaĉo povus fariĝi palacaj trezoroj al sovaĝaj pilgrimantoj en afrika dezerto aŭ eĉ al infanoj de montarloko neniam vidintaj ion pli bonan. Male ni jus konstatis, ke la plej bela vendopalaco kaj luksa aŭtomobilo facile ricevas bapton kiel butikaĉo kaj veturilaĉo, se ili kaŭzis al vi malagrablan atendadon. Kion konkludi?
Ke la tuto estas afero de juĝo. Kiam la juĝo estas ĝenerala, vi trovas la uzon logika; kiam ĝi estas persona, vi plendas pri mallogiko. Fakte la ideo de aĉ'eco ĉiam sidas en la parolanto mem multe pli ol en la objekto. La uzo subjektiva estas eĉ multe pli ofta tie ol la objekto. Tial potenca analogio regas kaj, aŭdinte vin ekkrii „butikaĉo" kaj „veturilaĉo", la infano aŭ alia ripetanto tute nature emos diri „knabaĉo", al kiu lin batas, aŭ „ŝnuraĉo", al kio rompiĝas sub liaj fingroj, kiam li penas fari pakaĵon.
Ĉar la homoj estas ĉie similaj, tia uzo ekzistas en ĉiuj lingvoj sub iu aŭ alia formo kaj neniel povus fariĝi kaŭzo de miskompreno. Fine en ĉiuj okazoj tamen regas la ideo pri aĉ'eco en la parolanto aŭ en la objekto.
La samo okazus al supozita sufikso **el'** (iam proponitan de Prof. Christaller por montri la malon de aĉ', do belon, bonon, admiron, ŝaton, laŭ vortoj kiel anĝelo, modelo, ĉielo, belo, mielo ktp.). Lingvo ne posedanta tian „admiran" sufikson uzas bildojn por ĝin anstataŭi. Ĝi diras „anĝelo" por hom'elo (bonega homo) aŭ „nektaro" por vin'elo (bonega vino) ktp. La procedo estas bone konata kaj neniu eraras pri ĝi aŭ esperas trovi verajn blankplumajn flugilojn sub la ĉemizo de la bonkora homo nomita „anĝelo". [Fino sekvas]

Aldonoj de la redakcio:

La libreto de Edmond Privat aperis 1931 en Genève: Universala Esperanto-Asocio, 67 p.
Edmond Privat (1889 — 1962), franclingva sviso, doktoro pri literaturo, verkisto, jurnalisto. Li estis i.a. prezidanto de UEA kaj iniciatis la prezenton de Esperanto al la iama Ligo de Nacioj.

1) E. Privat: Historio de Esperanto, Vol. I 1887 — 1900, Den Haag 1923; vol. II 1900 — 1927, Leipzig 1927
2) Intertempe tamen uzata por la estro de ŝtato: prezidento de la respubliko.
3) Louis de Beaufront estis unu el la plej aktivaj esperantistoj, kunaŭtoris kun Couturat la reformprojekton Ido. Beaufront-isto adepto de Ido.
4) Intertempe la Akademio de Esperanto akceptis la uzadon de -io kiel landnoman sufikson.

Kelkaj korektoj pri la listo de A. Knapp

La konata esperantologo prof. Gaston Waringhien el Francio sendis al ni kelkajn korektojn kaj komentojn al la listo de A. Knapp „Vortoj ne troveblaj en Krause kaj v. Waldowski, kiun ni presis en „der esperantist" 6/1986, p. 133—136:

alizo devus esti: alizeo,
fug estas ja Zamenhofa radiko, sed nur kun la muzika senco!
konferenceo ne estas de Auld, sed nur citita de li: pri ĝi respondas Metodi Pančev, kvankam la bulgara vortaro tradukas tiun bulgarismon per „anoncanto (de programnumeroj)".
pantuno Mi supozas, ke oni legu „Fiksforma" . . .
reprodo kaj **trankvi** estas provoj de Kalocsay imiti la parolfantaziaĵojn de juna studentino, kaj ne meritas enesti en tia listo, ne pli ol „skrupedantulino" (kunfandaĵo de **skrupul-** kaj **pedant-**).
sistro La vorto ne estas Z-a; en II. SAM. VI,5, li skribis „tintiloj", kiun vorton la Londonaj pastroj ŝanĝis al „sistroj".
veo estas nur la substantivo de **ve**!
vermifugo estas ja Zamenhofa vorto, sed kun la senco de planto (= tanaceto)!
vermilono enestas en PIV, sub formo: **vermiljono**.
zefiro estis uzita de Selegnet en „La Esperantisto", sed ne de Zamenhof: krom en lis rusa-E-a vortaro.

La prezidanto de UEA: prof. d-ro Humphrey Tonkin

Novjara mesaĝo 1987

La Jubilea Jaro longe atendata nun staras antaŭ ni: Esperanto fariĝas centjara. Ke ĝi plene maturiĝis, tio estas evidenta jam delonge. Ne plu oni povas nomi Esperanton interesa eksperimento; ne plu oni povas priskribi nian lingvon kiel ambician provon al internacia kompreniĝo. Hodiaŭ Esperanto jam pruvis sian taŭgecon en ĉiuj medioj, kaj estas nenio tro komplika, nenio tro subtila — se entute ĝi estas lingve esprimebla — kiu ne povas esti esprimata en la Internacia Lingvo. Kiel lingvo Esperanto plene sukcesis. Ankoraŭ ne plene sukcesa estas la disvastigo de tiu lingve sukcesa fenomeno. La granda plimulto de la homaro neniam aŭdis pri Esperanto. Inter tiuj, kiuj scias, kio ĝi estas, ekzistas multaj homoj, kiuj ne plene komprenas ĝian grandan kapablon aŭ dubas pri la aserto j kaj pretendoj de tiuj, kiuj konas ĝin pli bone. Necesas dum la Jubilea Jaro atingi tiujn homojn, kiuj nenion scias pri Esperanto, kaj konviki ilin lerni la lingvon. Necesas atingi ankaŭ la skeptikulojn por forigi ilian skeptikecon. Necesas, entute, sukcesigi ne nur la lingvon sed ankaŭ la movadon por divastigi tiun lingvon. Okazoj tiel bonaj kiel la Jubileo ja venas malofte: necesas, ke ĉiu parolanto kaj uzanto de Esperanto streĉu sin ĝis maksimumo dum la Jubilea Jaro. Kion ni povas fari?

— Unue, ni povas instrui la lingvon, ekzemple per starigo de loka kurso, aŭ ni povas helpi aliajn tion fari.

— Due, ni povas verki artikolon aŭ artikolojn pri la lingvo kaj proponi ilin al loka aŭ nacia ĵurnalo aŭ gazeto.

— Trie, ni povas atentigi niajn amikojn kaj kolegojn pri Esperanto kaj ĝiaj atingoj, kaj klopodi konviki ilin esplori ĝin pli profunde.

— Kvare, ni povas kunlabori en alia agado, loka aŭ nacia, por informi la publikon pri Esperanto.

— Kvine, ni povas subteni la Esperanto-movadon per aĉeto de libroj, per partopreno en kongresoj kaj konferencoj, kaj per financaj kontribuaĵoj al lokaj, naciaj aŭ internaciaj Esperanto-organizaĵoj.

Efika informado pri Esperanto postulas efikan informiĝon: ni devas mem koni nian lingvon kaj nian movadon. Necesas prezenti la faktojn, klare kaj sen troigo aŭ subtakso. Necesas zorge kaj saĝe esprimi la argumentojn por Esperanto. Do, la unua neceso, se ni volas klerigi la publikon, estas klerigi nin mem. Kaj kiam ni elpaŝos por montri Esperanton al la publiko, ni povos apogi nin sur la iamaj atingoj de la Esperanto-movado, sur la rekono, kiun ĝi jam ricevis ĉe Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kaj sur la personaj spertoj de miloj da esperantistoj, kiuj profitis spirite, kulture, intelekte el sia utiligo de la Internacia Lingvo.

Fine, se ni deziras, ke nia lingvo de la paco efektive kreu pli pacan mondon, ni devas mem praktiki la pacon: nia lingvo plej rapide progresos se inter ni ni harmonie kunlaboros, kaj ĉiuj ligos inter si la manojn por komuna agado en la Jubilea Jaro.

HUANG HUA:

GRANDA IDEALO KAJ GRANDA PRAKTIKO

Salutvortoj al la inaŭguro de la 71-a UK

Estimata sinjoro Prezidanto,

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj,

Mi estas tre ĝoja, ke mi hodiaŭ povas ĉeesti la solenan inaŭguron de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto kaj saluti vin.

Bonvolu permesi al mi esprimi, en la nomo de s-ro Peng Zhen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, kaj en mia propra nomo, kiel prezidanto de la Honora Komitato de la kongreso, varman gratulon al la kongreso, sinceran bondeziron kaj koran bonvenigon al diverslandaj geamikoj, ĉeestantaj la kongreson.

Malgraŭ tio, ke mi bedaŭrinde ne lernis Esperanton, mi plene konscias pri tio, ke Esperanto mem estas granda idealo, granda strebo kaj ankaŭ granda praktiko. Ĝia centjara ekzisto kaj disvolviĝo plene montras ĝian fortan vivipovon. Tiu ĉi solena kongreso kun pli ol 2 000 partoprenantoj el diversaj partoj de la mondo estas ĝuste inspira ekzemplo. Antaŭ nelonge, en sia 23-a Ĝenerala Konferenco, Unesko aprobis rezolucion pri festado de la centjariĝo de Esperanto. Ankaŭ tio pruvas, ke pli kaj pli da homoj konsciiĝas pri la signifo de Esperanto kaj komprenas ĝian rolon, kaj Esperanto mem ricevas ĉiam pli vastan internacian agnoskon.

La ĉina popolo havas longan tradicion en la amo al Esperanto. Tiel frue kiel tuj post la Revolucio de 1911, fama ĉina demokrato kaj pedagogo Cai Yuanpei jam iniciatis, kiel la tiama ministro de edukado, ke Esperanto disvastiĝu tra Ĉinio; poste, granda pensulo kaj literaturisto Lusin, granda historiisto kaj literaturisto Guo Moruo kaj eminenta verkisto Mao Dun estis entuziasmaj subtenantoj de Esperanto en nia lando. La forpasinta s-ro Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de ĈPR, same kiel s-ro Bakin, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio, mem estis esperantisto. Pere de Esperanto ili konigis al Ĉinio eminentajn verkojn de alilandaj literaturoj. Ne nur tio, sed ili ĉiam fervore aktivadis por la Esperanto-movado.

Ekde la 30aj jaroj, la Esperanto-movado de Ĉinio kunfandis sin en la batalon de la ĉina popolo por nacia liberigo kaj ludis en ĝi sufiĉe grandan rolon. Sekve de tio, post la fondiĝo de nia popola respubliko, la registaro de nia lando donis jam dekomence diversflankan subtenon al Esperanto. Ĝuste en tia historia fono, nia marŝalo Chen Yi, unu el la eminentaj gvidantoj de nia lando, faris en 1963 proponon pri okazigo de Universala Kongreso de Esperanto en nia lando. Kaj jen, hodiaŭ realiĝas lia longevida kaj sagaca iniciato! Tio tute ne estas hazardo. Tio estas rezulto de senĉesa laboro de nialandaj esperantistoj dum dekoj da jaroj.

Sincere dirite, nia kontribuo al Esperanto estas nek tiel granda nek impona, kiel lando kun vasta teritorio kaj multa loĝantaro, kia la nia, devus fari. Ĉinio havas pli ol miliardon da loĝantoj, preskaŭ kvaronon de la tutmonda loĝantaro. Nia lando, kompreneble, devas fari pli multe da kontribuoj al la homaro, kaj ankaŭ al la granda idealo de Esperanto.

La kongresa temo „Interkompreniĝo, paco, evoluo" estas ege trafa, ĉu kiel omaĝo al la Internacia Jaro de Paco, ĉu kiel atentigo pri la aktuale urĝaj problemoj de la homaro.

Oni tamen ne rajtas pretervidi, ke la nuna mondo ne kvietas, kaj milita minaco regas super la popoloj. Sed aliflanke, estas necese emfazi, ke la pacaj fortoj de la mondo vigle kreskas, kaj tio estas frukto de la luktado de diverslandaj popoloj por defendi la pacon. Tiu luktado ampleksas ankaŭ la grandan strebadon de diverslandaj esperantistoj. Ekde sia naskiĝo Esperanto ligiĝas kun pacaj idealoj. Ĉiu-

jare la Kongreso de Esperanto tial estas solena mnaifestacio de la paca potencialo de esperantistoj. Tia estas precipe la ĉi-jara, kiu estas aparte signifa kiel unu el la gravaj aktivadoj en la Internacia Jaro de Paco.

Kiel konate, nia lando praktikas pacan diplomatian politikon de sendependeco kaj memdecido. Ni ĉiam opinias, ke la landoj, ĉu grandaj ĉu malgrandaj, sen konsidero pri la socia aŭ politika sistemo, povas kaj devas disvolvi rilatojn de komuna harmonio kaj amika kunlaboro surbaze de la kvin principoj de paca kunekzisto. Mi estas konvinkita, ke tiaj politiko kaj kredo de nia lando respondas al la Zamenhofa spirito, sekvata de ĉiuj pacamaj esperantistoj.

Por sin modernigi, nia lando praktikas pordmalferman politikon. Tia politiko koncernas ĉefe, sed ne nur la ekonomion. En la lastaj jaroj nia lando atingis fortan disvolviĝon de la interŝanĝo de scienco, tekniko, kulturo, literaturo, arto ktp. kun aliaj landoj. Tiaj interŝanĝoj ankoraŭ estas pli vastiĝantaj.

En la nuna mondo ĉiaj sciencoj kaj teknikoj rapide evoluas. Akcelado de tutmonda interŝanĝo en sciencoj kaj tekniko jam fariĝis la nepre necesa kondiĉo por la evoluo kaj progreso de la homaro. Esperanto kiel internacia komunikilo devas kaj povas ludi sian pozitivan rolon sur tiuj kampoj.

UEA decidis okazigi en Ĉinio ĉi tiun imponan kongreson antaŭ la Centjara Jubileo de Esperanto. Tio estas ekstreme granda konfido al nia lando kaj al la ĉina Esperanto-movado. Por ne vanigi la esperon de la tutmonda esperantistaro, LKK faris grandan kvanton de laboro. Mi elkore esperas, ke la kongreso disvolviĝos glate kaj plene sukcesos.
Mi deziras al la diverslandaj geamikoj sanon kaj agrablan restadon en nia lando.

Koran dankon!

[Huang Hua estas vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de ĈPR kaj prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK.]

Publika MEM-kunveno

Kadre de 71-a UK de Esperanto en Pekino okazis publika kunveno de MEM. Ĝin partoprenis proksimume 60 pacamantaj esperantistoj el 13 landoj. La sekretario de MEM, s-ino Vasja Cvetkova, parolis pri la rolo kaj loko de la esperantistoj en la pacmovado, pri iliaj aktivecoj kaj antaŭstarantaj taskoj. Ŝi informis la publikon pri la granda laboro de la esperantistoj subtene al la „Apelo el Hirošima kaj Nagasaki por totala malpermeso kaj elimino de nukleaj armiloj". Multaj ĉeestintoj rakontis pri siaj agado kaj kontribuo, pri siaj malfacilaĵoj. Japanino donacis al la reprezentantoj de pluraj E-kluboj multkolorajn girlandojn el falditaj papergruoj — simbolo de la paco en Japanio. Tiujn girlandojn oni metas antaŭ la monumentojn de la hibakŝoj. La kunvenintoj akceptis unuanime telegramon al la Internacia Komitato por Akcelo de la Subskribo kun sidejo en Tokio kun la jena teksto: „Ne! — al nukleaj armiloj. Jes! — al la paco!"

V. Antonova

TRADUK-KONKURSO 1986

Jen ni volas informi vin pri la rezultoj de la „traduk-konkurso 1986", kiu ja okazis laŭ iomete aliaj kondiĉoj ol dum la pasintaj jaroj. Partoprenis 15 personoj kun 21 tradukaĵoj, kvankam la kondiĉoj estis por la partoprenintoj pli malfacilaj kaj postulis pli grandan aktivecon de la unuopuloj.

Jen la plej bonaj:

1. Gerda Häusler, Magdeburg
— por „Traarbara promenado" de Wolfgang Zeiske; kaj
— por „Malplena tempo" de Joochen Laabs;
2. E. + H. Plümecke, Magdeburg
— por „La ridado" de Hannes Hüttner;
3. Esperantogruppe Apolda
— por „Tedo je hepataĵoj" de Renate Holland-Moritz.

Ni tre kore gratulas al ili kaj samtempe dankas al ĉiuj, kiuj partoprenis nian konkurson. Samtempe ni invitas ĉiujn partopreni ankaŭ en la jaro 1987.

Dieter Berndt

La tombo de internacia amikeco

En la malferma soleno de la 73a Japana Kongreso de Esperantistoj en Osaka, salutis germana samideano[1]), menciante ekziston de la tombo de internacia amikeco:[2])

„En iu malgranda vilaĝo de Orienta Germanio troviĝas malnova tombejo, en kiu esperantistoj ĉiujare vizitas la tombon. La nomo de la japano estas Eiiĉi Doi-Cuĉii. Sur la tomboŝtono legeblas en Esperanto kaj en la germana: „Ĉi tie dormas Eiichi Doi-Tsuchii 1909-1933, nia karega amiko, kiu amegis Germanujo kaj ĝis sia morto, sed kies malforta korpo ne permesis al li fari la grandan laboron por la amikiĝo de Germanujo kaj Japanujo kaj plue de Okcidento kaj Oriento. Li ripozu en Dio.". Ĉu iu el vi konas lin?"

Dume iom antaŭe, iu membro de nia grupo ricevis leteron el Germanio[3]) pri la tombo. Do ni estis esplorantaj pri Eiiĉi Doi-Cuĉii, kaj akiris iom da konoj pri li. Aŭdinte la saluton de la germana samideano, la verkinto promesis pli detale esplori pri Eiiĉi kaj sciigi tion al la germana samideano.

Jen nun tiel klariĝis la fakto:

Eiiĉi estis filo de tre fama poeto CUĈII Bansui (1871 — 1952), kies poezio „La Luno Super la Kastelo-Ruinoj" estas tre konata al japanoj kun la melodio de TAKI Rentaroo. (La poezio estas esperantigita de K. OSSAKA kaj poste de MIYAMOTO (mijamoto) Masao sub la titolo „La Luno super la ruino de kastelo".) La familia nomo estis komence Cuĉii, sed en 1932 la familio ŝanĝis la legmanieron de la nomo al Doi. (Rim.: En la japana lingvo por Cuĉii kaj Doi oni uzas la samajn literojn.) En 1950 Bansui ricevis Kulturan Ordenon, kiu estas la plej altnivela en japana kultura kampo.

Nu, ankaŭ la filo Eiiĉi estis riĉe dotita en lingva kapablo. Li eklernis Esperanton, kiam li estis mezlernejano, kaj en alta lernejo li refondis Esperanto-Grupon. Li estis tre fervora ne nur en Esperanto-movado, sed ankaŭ en aliaj kampoj humanismaj, kaj laboris energie por ili.

Li havis multajn eksterlandajn korespondantojn, inter kiuj estis germano, Johannes Schröder (johannes ŝreder), instruisto de elementa lernejo en vilaĝo Marbach[4]) (marbaĥ). Tiu ĉi estis 20 jarojn pli aĝa ol Eiiĉi, sed ili respektis unu la alian kaj sentis sin kiel intimaj fratoj. Iliaj leteroj estis ĉiam longaj kaj tre oftaj. Ili fervore prezentis sian landon reciproke. Eiiĉi korespondis ankaŭ kun geknaboj en la lernejo de Johannes, kaj sendis al ili donacetojn.

Sed ĉu pro troa entuziasmo en multaj kampoj, lia sano difektiĝis. Por kuraĝigi lin lia pli aĝa fratino proponis al li sendi grandan karpofiguran flagrubandon al la lernejo de Johannes. Li aldonis la klarigon: En Japanio en la 5a de majo oni aranĝas la flagrubandon en ĝardeno por festi la tagon de knaboj. Karpo estas vigla fiŝo ...

Ricevinte du karpajn flagrubandojn, ĝojis geknaboj kaj ankaŭ vilaĝanoj, kaj ili feste aranĝis en korto de la lernejo. La foto en la ĝojo aperis sur loka gazeto. De tiam Eiiĉi kaj lia fratino decidis ĉiujare sendi karpan flagrubandon al diversaj lernejoj, sed baldaŭ la fratino mortis, kaj unu jaron poste forpasis ankaŭ Eiiĉi. Kiam li estis ankoraŭ 24 jara.

En la morta lito lin katenis la ideo pri eldono de bonfaraj poŝtmarkoj, iom pli altekostaj ol ordinaraj, kaj la aldonan koston oni uzos por bonfaroj. Li ekhavis la ideon tra la korespondo kun Johannes. Eĉ minutojn antaŭ la morto li parolis pri la projekto al sia amiko. Post lia morto la ideo estis efektivigita dank' al la klopodo de parlamentano, kiu estis amiko de lia patro. Tio tamen ne celis bonfaron al lepruloj, kiel deziris Eiiĉi, sed tio estis nomita „patriotisma poŝtmarko", kiu kontribuis al aferoj pri privata aviado.

Kelkajn monatojn post lia morto lia patrino trovis lian testamenton en tirkesto en vilao, kie ofte ripozis malsanema Eiiĉi. En ĝi estis skribite, ke post la morto li ripozu en Germanio, kiun

li amegis. Li testamentis eĉ tekston, kiu estu ĉizita sur la tomboŝtonon. La gepatroj konsiliĝis pri tio kun Johannes kaj sendis urnon kun liaj ostoj al Germanio, de la haveno de Jokohama. Kaj en Hamburgo Johannes akceptis ĝin kaj kune kun vilaĝanoj entombigis en la vilaĝo Marbach. Poste la gepatroj ricevis belajn rubandojn gladitajn, kiuj ornamis bukedon ĉe la entombigo.

Post lia morto liaj amikoj fondis internacian societon de karpofiguraj flagrubandoj, kaj sendadis ĉiujare la flagrubandojn al eksterlandaj lernejoj.

Tiel nun novaĵoj tamtamas malnovaĵojn.

DOI Cieko, Jokohama

Rimarkoj de la redakcio:

[1]) Temis pri d-ro Detlev Blanke el Germana Demokratia Respubliko.

[2]) Vidu „der esperantist" n-ro 137 (3/86), p. 58.

[3]) Temas pri GDR.

[4]) Marbach troviĝas nun sur la teritorio de GDR.

Honorinsigno por Andrzej Pettyn

Dum la 24a Pola Esperanto-Kongreso (23. — 29. 8. 86 en Krakovo) la estro de la Esperanto-redakcio de Radio Polonia kaj vicprezidanto de PEA estis distingita per la Honorinsigno de GDREA. Andrzej Pettyn havas tre grandajn meritojn en la alproksimiĝo de la popoloj de GDR kaj Pollando pere de la internacia lingvo Esperanto.

La perdiĝonta honoro de iu Virrikardo Ŝ. kaj la problemo de la propraj nomoj

Jam delonge mi atente observas la disputon pri la skrib-- resp. tradukmanieroj de la propraj nomoj en Esperanto kaj la argumentadon de la diversaj opinioj. Certe tio estas unu inter la problemoj de nia lingvo ĝis nun ankoraŭ ne tute solvitaj. Kiel tradukisto ankaŭ mi ofte estas konfrontata kun ĉi problemo.

Sekve de la traduko de la romano „La perdita honoro de iu Katarino Blum" flanke de R. Schulz (elp. Ŝulc) la disputo ricevis novan „eksplodaĵon". Tio estas la ununura valoro de tiu traduko.

Plua ne ekzistas. Mi tute konformas kun la opinio de Germain Pirlot („der esperantist", n-ro 135, p. 9) kaj kun similaj opinioj. Mi legis multajn librojn tradukitajn en Esperanton, sed „La perdita honoro ..." estis la plej malbona, kiun mi vidis iam ajn. Ĝi ankaŭ ne estas „aprobinda iniciato", kiel skribis J. Kavka („der esperantist", n-ro 135, p. 9), sed provoko kaj ... degradado de la aŭtoro H. Böll (esp. Bel) en Esperantujo. Tio estas bedaŭrinda, ĉar oni konas multajn, vere bonegajn tradukojn de Schulz.

Inter la malperfektaĵoj de la traduko oni precipe notas multajn pezecajn pasintec-formojn de la verbojn (kiuj estas kutimaj kaj normalaj en la germana lingvo, sed ne en Esperanto) kaj la problemon de la propraj nomoj. La lastan en duobla rilato:

Unue. Oni ne devas aldoni la sufikson „-ino", por rekonebligi la respektivan personon kiel sinjorinon aŭ fraŭlinon. Tiu senco montriĝas el la teksto. Laŭ mia kono neniu tradukisto uzis ĝis nun tian formon. La germana ina antaŭnomo Else ekz. do estas Else kaj ne Elzino (same kiel la franca Francoise ne estas Francoasino, la angla Dorothy ne Dorotino aŭ la araba Fatima ne Fatimino!). La rusan inan antaŭnomon Tanja oni traduku Tanja. Tiu nomo estas ĝusta kaj ne Tanjo aŭ Tanio, kaj nepre ne Tanjino. La „-ino"-formo por propraj nomoj sekve en la Esperanto-literaturo ne estas uzebla propono, sed kripligo kaj eĉ taŭtologio. Ŝerce: laŭ la konsekvenco de R. Schulz oni traduku la viran antaŭnomon Johannes kiel vir-johano ktp. simile virkato kaj katino!

Due. La traduko de familiaj nomoj kaj nomoj de urboj, riveroj, montoj ktp. ne estas tro malfacila. Esperanto estas lingvo skribata per latinaj literoj kiel la germana, franca ktp. Kial do kripligi (aŭ ŝanĝi) la nomojn jam fiksitajn per la kutima skribmaniero en la resp. lingvo? La fama Kaloscay laŭ mia kono neniam skribis sian nomon Kaloĉoj!

Waringhien ne skribas Varingjeno aŭ Varingieno, Auld estas Auld kaj ne Oldo, Humphrey Tonkin ne estas Hamfri Tonkin ktp! Feliĉulo sin nomu tiu, kiu posedas netransskribendan kaj nekripligeblan nomon (kiel ankaŭ mi!).

Tute alia afero estas nomoj el lingvoj, ne skribitaj per latinaj literoj, ekz. el la araba, ĉina, hinda. Ilin oni devas transskribi eĉ en latinliterajn lingvojn. Kaj en ĉiu lando oni transskribas ilin tiel, kiel la tiea prononco permesas. Ĉe ni ekz. oni skribas Tschajkowski, en Francio, Anglio, Hispanio tute alie. Do oni traduku tiun nomon (kaj ĉiujn aliajn vortojn el nelatinliteraj lingvoj), kiel estas kutima laŭ nia „fundamento": Ĉajkovski. Tio ne estas kripligo, sed tute normala transskribo. Plej bone oni lasas tiajn tradukformojn al tieaj esperantistoj. La sama validas rilate al la nomoj de urboj ktp.. Ekzemplodona estas tiurilate la uzado de propraj nonoj en la ĉina revuo „El popola Ĉinio". Tie oni trovas eĉ neĉinajn nomojn en la originala skribmaniero, kaj neniu ĉina esperantisto kripligas sian nomon, ekz. Ĝuano Ĝino por Ĝuan Ĝin!

Mi mem eĉ estas preta, akcepti ĝis nun neuzitajn nomojn de landoj, urboj ktp.: Se ekzemple la finnaj esperantistoj opinias, ke la ĝusta nomo de ilia lando estu „Suomio" ("Suomi" estas la finna resp. suoma nomo), tiam ni forgesu la nomon „Finnlando" kaj uzu „Suomio". D-ro E. D. Krause, ankaŭ uzas tiun ĉi vorton (krom „Finnlando") en sia vortaro „Deutsch-Esperanto". La sama koncernus „Niponio" anstataŭ „Japanio" aŭ similajn. Verdire nomoj kiel Finnlando, Japanio ktp. estas lingvaj perfortoj.

Restas la demando: kiel klarigi al la legantoj la ĝustan prononcon de la neesperantigitaj nomoj el latinliteraj lingvoj? Ankaŭ por tio ekzistas solvproponoj jam aprobitaj: En romanoj, en kiu la fremdaj nomoj ofte ripetiĝas, la tradukisto aldonu suplementon kun la respektivaj naciaj nomoj (kiujn oni trovas en la teksto) kaj la prononco en Esperanto. La plimulto de la romantradukistoj faras tiel, kaj tre bone nia d-ro Karl Schulze (Ŝulce) praktikis ĉi metodon en la traduko de la libro „Nuda inter lupoj". R. Schulz ja povus diri: „Mi ja ankaŭ praktikis tion en „La perdita honoro . . .!" Jes certe, sed li „degermanigas" ĉiujn nomojn en la tuta romano, forigas la germanan karakteron de la verko. Kaj en la suplemento li ne klarigas la prononcon de la germanaj sed provas „regermanigi" la Esperante kripligitajn nomojn de la teksto. Tio estas granda diferenco kaj troviĝas en kontraŭdiro al la praktiko. La dua vojo por klarigi la prononcon de originale skribitaj nomoj rilatas al artikoloj, traktatoj, eseoj ktp., en kiuj fremdaj nomoj nur unu- aŭ dufoje aperas. Tiukaze la aŭtoro aŭ tradukisto uzu la ĝustan (nacilingvan) nomon kaj aldonu (nur unuafoje) la Esperantan prononcon metitan en krampoj. Tiamaniere oni ne kripligas naciajn nomojn kaj samtempe ebligas al la leganto, kompreni kaj prononci ilin. Mi konscias, ke mia priskribo ne tute elĉerpas la temon. Tion mi ja ne intencis, sed mi nur deziris klarigi mian starpunkton en tiu ĉi demando, ĉar mia opinie estas necese rezisti al ĉiuj formoj, kiuj ebligas kaŭzi konfuzon en la uzado de Esperanto.

Manfred Arnold

Turisma klubo Praga:

Marŝo: „Ĉirkaŭ Klánovice"

dato:
sabato 20an de junio
startoj:
50 km kaj 35 km: finstacio de metroo-linio „C" Kosmonautů 6.00 — 8.00
25, 14, 9 km: fervojstacio Praha-Klánovice /ČSD linio 011/ 7.00 — 10.00
celo:
restoracio Smolík ĉe fervojstacio Praha-Klánovice ĝis 19.00 horo
tranokto:
kiu sendos bildkarton kun deziro tranokti havos eblecon dormi. Indiku en kiu tago vi alveturos (ĉu vendrede vespere aŭ sabate matene kaj ĉu vi restos ankaŭ dimanĉe).
kion poste:
kiu restos post la marŝo dimanĉe, por tiu okazos sabate vespere interesa prelego pri belaj naturaj lokoj kaj dimanĉe okazos ekskurso en interesan lokon.
aliĝo:
ne necesas! Kiu alveturos sabate matene kaj tuj post marŝo veturos hejmen, venu sen antaŭaliĝo al starto laŭ de vi dezirata longeco de la marŝo. Startoj vidu supre!
Kiu volas dormi kaj poste marŝi skribu!
informo:
Jaroslav Kašparec
Vlkova 30
130 00 Praha 3

„Paco" ab 1987 ganz billig

Alle Mitglieder des Esperanto-Verbandes werden aufgerufen, das Organ der Weltfriedens-Esperanto-Bewegung „Paco" zu abonnieren bei: Post- und Fernmeldeamt Falkenberg, Zentralvertrieb d. PZV, 7900 Falkenberg, Uebigauer Straße 4.
Bisher war der Abonnementspreis unvertretbar hoch. Jedoch ist es gelungen, den Preis derart günstig anzusetzen, daß jeder in der Lage ist, diese wichtige Zeitschrift zu abonnieren. Das Abonnement wird ab 1987 pro Halbjahr M 1,80, d. h. 6 Hefte pro Jahr (96 Seiten) für M 3,60! Frühester Anmeldetermin bis 30. April 1987, um ab Nr. 4/87 das Abonnement beginnen zu können.
Hinzu kommen einzelne Landesausgaben, so z. B. jährlich eine 40seitige Nr. der DDR-Ausgabe des „Paco", die auf Verlangen jedem Abonnenten kostenlos zugesandt wird.

GDR-eldono de „Paco" 1986

La eksterseria kajero de „Paco", eldonata ĉiujare unufoje pere de la MEM-Sekcio de Germana Demokratia Respubliko, 1986 aperis bedaŭrinde kun malfruo. Tamen, ankaŭ ĉi-foje la 40-paĝa kajero entenas multe da valora materialo. Ni trovas jenajn ĉefajn kontribuojn:
Romesh Chandra: La jaro de la paco
Frank Sharman: La nuklea vintro
Miĥail Gorbaĉov: Por liberigo de la mondo de atomarmiloj
Adam Daniel Rotfeld: La proceso de Helsinki: Signifo kaj perspektivoj
Ralf Stöhr: Eŭropo devas fariĝi regiono sen kemiaj armiloj
S. Dhawan: Armadkontrolo kaj militizado de la kosmo
Boris Ionas: Eĉ la vorto iĝis armilo
Wolfgang Borchert: Tiam nur eblos ...
Wolfgang Kleinwächter / Falko Raaz: Usono kontraŭ UNESKO: akuzo aŭ ĉantaĝo?
Amadou Mahtar M'Bow: La vivo mem decides pri la laboro de UNESKO
Jaroslav Haŝek: Interveno de la brava soldato Ŝvejk en la mondmilito
Amadou-Mahtar M'Bow: La rajto je komunikado
Werner Illberg: Kristnaska legendo
B. V. Tokarev: V. I. Lenin pri lingvoj
Fritz Wollenberg: La korektita Zamenhof
A. Vaitilaviĉius kaj Bernard Golden: Pri la Marx-teksto
Canko Murgin: Rompu la muron inter la nacioj kaj rekonstruu la homaron (pri Zamenhof)
Günter kaj Johanna Braun: Viro kun gitaro
La kajero estas havebla ĉe GDREA por 1 marko. **Abonintoj de „Paco" en GDR ricevos la kajeron senpage laŭ aparte sendenda peto.**

Für die DDR-Leser:

Abonnieren Sie auch für Ihre Freunde!

Liebe Leser! Sie sind Abonnent unserer kleinen Zeitschrift. Sicher nutzen Sie die Möglichkeiten der internationalen Korrespondenz mit Esperanto-Freunden im Ausland. Haben Sie schon einmal erwogen, auch Ihren Korrespondenzpartnern ein Abonnement zu schenken? Abonnieren Sie doch mehrere Exemplare bei Ihrer Post! Sie hätten ein interessantes Geschenk für Ihre Freunde!
Ihre Redaktion

Bulgaroj demandas pri „der esperantist"

Venis kolektiva demando de esperantistoj el Veliki Tarnovo: „Ĉu ‚der esperantist' ĉesis aperadi, ĉar dum la lastaj jaroj ĝi ne estis abonebla en Bulgario. Kiamaniere oni povas aboni ĝin?"

Respondo de la redakcio:

Nu, evidente „der esperantist" ne ĉesis aperadi, kvankam tro ofte aperas kun malfruoj. Nia redakcio regule sendas interŝanĝe kontraŭ „Bulgara Esperantisto" al ties redakcio 200 ekzemplerojn. Kompreneble ni ne scias, kiu ricevas tiujn ekzemplerojn. Ni supozis, ke bulgaraj esperantistoj povas aboni la revuon ĉe BEA. Antaŭ kelkaj jaroj larevuo estis abonebla pere de la bulgara poŝto. Pro kaŭzoj nekonataj al ni, la bulgara poŝto ne plu peradas la revuon. Malsame al ĉi-tiu situacio, membroj de GDREA povas aboni al „Bul-

gara Esperantisto" ĉe nia Centra Estraro. Ni volonte helpos, ke „der esperantist" ankaŭ estos reabonebla en Bulgario kaj faris tiaspecan proponon al BEA.

La red.

Interlingvistiko

La 8a interlingvistika seminario en Zempin

Pri la lingva bariero

La jam fama serio de germanlingvaj interlingvistikaj seminarioj en GDR estas ligita al la ĉe-baltmara vilaĝo (ripozloko) Ahrenshoop. Ĉi-jare, tamen, la tradicia seminario okazis esceptokaze en alia loko: en Zempin, sur la duoninsulo Usedom. De la 28a de oktobro ĝis 1a de novembro 1986 renkontiĝis 30 lingvistoj el jenaj institucioj: **universitatoj** Leipzig, Halle, Greifswald, Berlin, Rostock; **teknika altlernejo** Magdeburg; **inĝenieraj altlernejoj** Dresden, Zittau; **pedagogiaj alternejoj** Leipzig, Güstrow, Dresden; **Kulturbund**; **Akademie-Verlag** Berlin, **Centra Instituto por Lingvistiko** ĉe la Aakademio de Sciencoj de GDR; **Minafera altlernejo** (ĈSSR). La kadra temo estis „Aspektoj de la lingva bariero", al kiu estis dediĉitaj la plej multaj prelegoj. Jen ili:

— Malfermo de la seminario: Interlingvistikaj seminarioj — celoj, rezultoj, perspektivoj (d-ro sc. Detlev Blanke, Kulturligo)
— Pri la historiaj aspektoj de la bariero (d-ro Ronald Lötzsch, Centra Lingvistika Instituto de la Akademio de Sciencoj)
— La internacia lingva bariero — manifestiĝoj kaj efikoj (d-ro sc. Detlev Blanke)
— Funkcia lingvopriskribo — ebla strategio por venki lingvajn barierojn? (doc. d-ro sc. Hans-Jürgen Mattusch, Martin-Luther-Universitato Halle)
— Plej novaj tezoj pri la praktika utiligo de la Latina (prof. d-ro sc. em. Johannes Irmscher, Akademiano)
— Pri la historio de la tradukado (d-ro Wolf-Dietrich Wendt, Humboldt-Universitato Berlin)
— Pri la lingva bariero el la vidpunkto de tradukisto (Hans-Joachim Grimm, tradukisto)
— Romanid — nova planlingvo (d-ro Klaus Rackebrandt, Humboldt-Universitato Berlin)
— Genotipoj kaj fenotipoj en naturaj lingvoj kaj planlingvoj (prof. d-ro sc. Werner Reinecke, Karl-Marx-Universitato Leipzig)
— Teoriaj kaj praktikaj problemoj de la lingva konfrontado — ĉe la ekzemplo de la lingvoj rusa kaj germana (prof. d-ro sc. Werner Mühlner, Pedagogia Altlernejo Güstrow)
— Pri la klasifikado de morfemoj (PhDr. Fritz Spitz, CSc, Minafera Altlernejo Ostrava, ĈSSR)
— Pri interlingvistiko kaj formalaj lingvoj (prof. d-ro sc. Joachim Dietze, Martin-Luther-Universitato Halle)
— Komputada lingvistiko kaj Esperanto (d-ro Hartmut Sörgel, Humboldt-Universitato Berlin)
— Pri kelkaj aktualaj tendencoj en la evoluo de interlingvistiko/esperantologio (d-ro sc. Detlev Blanke)
— Tekstlingvistikaj esploroj pri anglaj pedagogiaj tekstoj (d-rino Sabine Fiedler, Pedagogia Altlernejo Leipzig)
— Planlingvo kaj lingvoplanado: pri normigado de normprincipoj en Esperanta terminologio (Wera Blanke)
— Propraj nomoj en anglaj pedagogiaj faktekstoj (d-rino Sabine Fiedler, Pedagogia Altlernejo Leipzig)
— Pri la ideologia kaj organiza struktura de la internacia komunikada komunumo de Esperanto (d-ro sc. Detlev Blanke)

Dum la tri vesperoj d-ro Blanke prezentis diapozitivojn pri Pekino kaj Japanio kaj pri la fenomeno de planlingva kongreso (en Esperanto). Krome li peris impreson pri la fonologia/fonetika strukturo de Esperanto surbaze de diversaj sonbendoj. Ne mankis la kutima ekspozicio de ĉirkaŭ 100 interlingvistikaj, faklibroj.
La 9a interlingvistika seminario okazos 1987, denove en Ahrenshoop.

—e

Doktoraj tezoj pri Esperanto en Brazilo

La pasintan 17-an de junio, Prof. José Passini, profesoro pri Esperanto kaj Itala Lingvo en Federacia Universitato de Juiz-de-Fora, defendis sian tezon „Priskribo de Esperanto" ĉe Federacia Universitato de Rio-de-Janejro. Ricevinte la maksimuman noton, li fariĝis doktoro pri lingvistiko. Lia tezo dividiĝas en pluraj partoj. Unue prof. Passini tuŝas la internacian komunikadon. En la dua ĉapitro li esploras la demandon „Ĉu lingvo internacia estas bezonata?". En la tria, estas pritraktata la Tradukado, ĉefe far organizajoj kiel Unesko, Ruĝa Kruco, Eŭropa Parlamento, k. c. Sekve li priskribas kaj komentarias la interlingvojn, komence la naturajn kiel la greka, ĉina, latina, franca kaj angla. Poste li profunde analizas la „duonartefaritajn lingvojn", finante sian tezon per komparo de Esperanto kun la angla, portugala, franca kaj itala.
En la posta semajno, la 23-an de Junio, akademiano Geraldo Mattos, kiu estas doktoro pri la portugala lingvo, profesoro pri Esperanto kaj pri lingvistiko en Federacia Universitato de Paranao, prezentis al ĝia departemento pri lingvistiko, denaskaj kaj klasikaj lingvoj, la tezon „Diskuto pri la Polemiko Rilate al la Participoj en Esperanto", kiu ampleksas 190 paĝojn. De la kvin ekzamenintoj li ricevis la meznombron 10,0 kaj tiel fariĝis „titola profesoro pri lingvistiko". La tezo pritraktas la diskutojn kaj disputojn pri la pasivaj participoj en Esperanto. Prof. Mattos studis laŭ historia vidpunkto, la disvolviĝon de la du uzoj (-ita -ata) kaj poste laŭ lingvistika vidpunkto, li konkludas kiu estas la vera uzo, akorde kun la spirito de la esperantista lingvo.

Interlingvistika diplomverko

En la Sofia universitato bakalaŭro pri bulgaraj lingvo kaj literaturo, Kremona Bačeva,

la 3an de junio 1986 defendis diplomtezon pri la plej gravaj planlingvoj dum 19a kaj 20a jarcentoj. Ŝi kompare priskribis kvin planlingvojn: Volapuko, Esperanto, Ido, Occidental kaj Interlingua. Ŝi evidentigis per pluraj komparoj la avantaĝojn de la aŭtonoma (skemisma) sistemo de konstruo de planlingvoj ol la naturisma. La verkon akompanas riĉa bibliografio.
Al la demandoj kaj kritikaj intervenoj Bačeva brile respondis kaj rezulte ŝi ricevis perfektan pritakson.
Ni varme gratulas kaj bonvenigas la junan interlingvistinon kaj deziras al ŝi pluajn sukcesojn.

La red.

„Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj"

La kvaronjara periodaĵo „Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj" (TST), eldonata de la Scienc-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, montris rimarkindan evoluon ekde la apero de la unua numero en 1985. Tiu unua numero ekhavis plurajn artikolojn pri la utileco de Esperanto kun la konataj argumentoj, kelkajn sciencrilatajn artikolojn transprenitaj el aliaj Esperanto-revuoj, malmultajn raportojn pri la atingoj de ĉinaj sciencistoj sur iuj kampoj kaj iom da alia informa materialo.
La ĝis nun aperintaj pluaj numeroj (1986/1, 1986/2, 1986/3) enhavas artikolojn precipe pri diversaj sciencaj temoj verkitaj de ĉinaj fakuloj. Kiel ekzemplon ni menciu kelkajn el ili: novaj esploroj pri la mekanismo de metala oksidiĝo, ĉina tekstoprilabora programo, grundoplibonigo, scienc-esplora administrado, ĉela fekundiĝo, artefarita inteligenteco, sukcesoj de la Pekina Medicina Universitato, bakterioj kaj homoj, reguligo de ebenaĵoj ĉe ĉinaj riveroj, nitrogenfiksado de nelegumenacaj arboj, antikorpo kontraŭ hepatkancero, astronomio en Ĉinio.
La revuo aperigas ankaŭ aktualajn informojn pri la ĉina scienca Esperanto-movado.
Konsiderinde pliboniĝis ankaŭ la lingvaĵo de TST. Dum la unuajn numerojn karakterizis amaso de lingvaj malglataĵoj kaj eĉ elementaj eraroj, la lasta numero jam estas lingve sufiĉe polurita. Semtempe plibeliĝis la revuo ankaŭ el teknika vidpunkto.
La revuo daŭre estas dulingva (Esperanto kaj ĉina) — la samaj tekstoj aperas en ambaŭ lingvoj, kio certe estas utila por ĉinaj fakuloj lernantaj la Internacian Lingvon. Tamen la revuo povas certe utili ne nur al ĉinoj, sed ankaŭ al alilandaj fakuloj, ĉu komencantoj, ĉu jam bone parolantaj Esperanton. La legantoj de TST, krom pliperfektigo de sia (faka) lingvoscio, ricevos trarigardon pri la sukcesoj de la ĉina scienco kaj tekniko — tian trarigardon, kian oni eble mehfacile povus akiri el aliaj fontoj.

A. Lukács

[El „BudapeŝtaInformilo 10/86]

Elpaŝo de rumana lingvisto

Akademiano Iorgu Iordan estas konata lingvisto en Rumanio. 1982 aperis libro, kun diversaj respondoj al demandoj starigitaj al la akademiano de Valeriu Mangu. (Valeriu Mangu: De vorbâ cu Iorgu Iordan. Editura Minerva, Bucuresti 1982.) Sur p. 53 Valeriu Mangu starigas al la profesoro la demandon: „Ĉu vi konjektas . . . ke geografiaj idiomoj estas malaperantaj?" La respondo de la akademiano estas:

„Elirante de kelkaj asertoj de Stalin, faritaj en la fama broŝuro **La marksismo kaj la lingvistikaj problemoj,** iuj homoj diras, ke malaperos la lingvoj de la terglobo. Tiaj homoj ekzistas ankaŭ ĉe ni — mi konas unu, cetere tre seriozan homon, kun serioza lingvistika kulturo. Tio signifas ke 8 — 10 miliardoj da homoj parolu la saman lingvon, situacio, kiu al mi ŝajnas tute neebla. Ni akceptu, tamen, ke la socialismo progresos kaj la nacia konscienco malaperos, kvankam mi dubas pri tio . . .

Mi povas aserti nur tiom: malaperos kelkaj rudimentaj lingvoj kiuj estas parolataj de malgranda nombro de parolantoj, lingvoj kiuj ne estas kulturportantaj kaj servas nur kiel komunikilo inter homoj kun limigitaj kulturaj necesoj. Tiu procezo disvolviĝas nuntempe sub niaj okuloj. Sed ŝajnas al mi absurde, ke ekzistas sur la tero unusola lingvo, tiel kiel antaŭdiris Stalin kaj kiel kredas Alexandru Graur; ĉar mi ne vidas kiel, ekzemple, povus disvastiĝi la angla lingvo, kvankam ĝi estas multe parolata, mi ne vidas kial, ekzemple, la francoj lernus la anglan aŭ la germanoj kaj sovetianoj lernus la francan. Ankaŭ se okazus tutmonda milito, mi ne vidas kiu nacio kapablus venki kaj altrudi al aliaj sian lingvon, en la hodiaŭaj cirkonstancoj, kiam ĉiam pli multaj ŝtatoj posedas la atomajn sekretojn, kiuj, ŝajnas al mi, tute ne plu estas sekretaj. Ĉiu ajn tiuspeca konjekto ŝajnas al mi netaŭga. Aliflanke – mi ne scias kio okazos estonte — la artefaritaj lingvoj estas infanaĵo. Ni la rumanaj lingvistoj, havis la kuraĝon nei iun estontecon por tiaj lingvoj. En Bulgario, ekzemple, **Esperanto** estas tre disvastigita. Oni havas tie librojn skribitajn en tiu ĉi lingvo, fakajn societojn, sed mi demandas min, kiam la bulgaroj proponos iun dekreton per kiu la bulgara lingvo estu anstataŭata per Esperanto. La lingvo estas firme ligita de la nacieco: kiel esprimu la rumanoj sian specifon en ia fremda lingvo?"

Oni ne povas ne miri pri la asertoj de la akademiano pri Esperanto.

Interese estas, ke la akademiano kapablas juĝi la artefaritajn lingvojn „infanaĵo". Unue: li ne distingas inter projektoj kaj reale funkcianta lingvo (= Esperanto). Due: oni devas demadni sin, kial sufiĉe reputaciaj lingvistoj kiel Hugo Schuchardt, Jan Baudouin de Courtenay, Otto Jespersen, André Martinet kaj aliaj okupiĝis pri tia „infanaĵo".

Trie, ke la akademiano nutras siajn supozojn el la arsenalo de antaŭjuĝoj el tre malnovaj tempoj, montras lia demando, ĉu eble la bulgaroj „proponus iun dekreton per kiu la bulgara lingvo estu anstataŭata per Esperanto". Nu — neniam la demando estis starigebla kaj starigita tiel. Kompreneble Esperanto ne povas kaj ne devas anstataŭi naciajn lingvojn.

La fakto, ke reputacia lingvisto kuraĝas esprimi sin tiel rekompetente pri la planlingva fenomeno ĝenerale kaj pri Esperanto aparte, estas bedaŭrinda. Nur iom da konatiĝo kun la faka literaturo pri interlingvistiko kaj esperantologio kaj la centjara Esperanto montrus al li, ke pri „infanaĵo" vere ne temas.

Peter Levsen

El la vivo de GDREA

Dudekjara jubileo de la Esperanto-grupo en Zittaŭ

La subdistrikta laborgrupo Zittaŭ de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR fondiĝis la 24-an de septembro 1966. Okaze de la 20-a datreveno de tiu evento ni aranĝis la 28-an de septembro 1986 sub la devizo „Esperanto kaj la jaro de paco" trilandan renkontiĝon, kiun partoprenis 40 personoj el Ĉeĥoslovakio, Pollando kaj GDR. En la renkonteio 20 tabuloj raportis per fotoj kaj per aliaj dokumentoj pri la 20-jara agado de nia grupo.
Antaŭtagmeze la partoprenantoj kunvenis en la granda salono de la domo de Kulturligo Zittaŭ en kiu post la malfermo de la renkontiĝo sonbende eksonis la Esperanto-himno. Poste la gastoj, interalie la prezidantoj de la subdistrikta estraro de Kulturligo, de la distrikta estraro de la Esperanto-Asocio kaj de la Esperantoklubo en Jablonec, salutparolis kaj transdonis florojn kaj donacojn.
Nia grupestro estanta jam 60 jarjojn agema en la Esperanto movado kaj kunfondinto de la laborgrupo Zittaŭ, samideano Walter, koncize bilancraportis pri la aktivecoj de la grupo dum la pasintaj 20 jaroj. Li povis memorigi la ĉeestantojn pri la multjara kunlaborado kun la Esperanto-klubo en Jablonec kaj pri gravaj kulminoj de nia laboro, ekzemple pri la renkontiĝoj en Olbersdorf 1986 kun 90 partoprenintoj kaj en Seifhennersdorf 1972 kun pli ol 120 partoprenintoj el tri landoj, pri la intervjuo flanke de distrikta gazetraportisto de „Saksa Gazeto" kaj pri la raporto de la radiostacio Dresdeno koncerne la agadojn de la Esperanto-grupo Zittaŭ. Sed li ankaŭ devis raporti ke malgraŭ multflankaj poresperantaj agadoj ni ĝis nun preskaŭ ne sukcesis trovi novajn membrojn por nia grupo aŭ almenaŭ novajn adeptojn de Esperanto. Tamen ni daŭrigos niajn ĉi-rilatajn klopodojn sub la sperta gvidado de nia ĝisnuna kaj denove elektita grupestro.
La partoprenantoj de la renkontiĝo aplaŭdis rezolucion kontraŭ pluaj nukleaj eksplodigoj flanke de Usono kaj por la proponoj de Sovetunio rilate al la ĉesigo de la vetarmado. La rezolucion ni sendis al la kompetentaj instancoj de la urbo por ke oni transdonu ĝin al la packonsilantaro de GDR. La ĉeestantoj ankaŭ aprobis proponon peti la magistraton de la urbo Zittaŭ, en akordo kun la rezolucio de UNESKO kaj omaĝe al la centjariĝo de la ekzistado de Esperanto, nomigi straton en novkonstruita kvartalo de Zittaŭ laŭ la nomo de la iniciatinto de Esperanto.
Posttagmeze la renkontiĝantoj dum bela vetero faris busan ekskurson tra la montaro sude de Zittaŭ. Ĉiuj partoprenintoj de la renkontiĝo kontente hejmen reveturis kun bonaj impresoj pri GDR kaj pri nia urbo. Ni eblis sukcese aranĝi la jubilean rekontiĝon nur dank' al la subteno flanke de Kulturligo Zittaŭ kaj precipe de ties kunlaborantino, sinjorino Vogt.

[Laŭ materialo el Zittaŭ]

9a renkontiĝo de iamaj LEA-anoj

Eventuale ĝi estas tutmonde unika: la serio de renkontiĝoj de iamaj membroj de la laborista Esperanto-movado, kiu okazas unufoje ĉiujare en GDR, organizita de GDREA. La 9a renkontiĝo de 40 iamaj membroj de Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) sukcese pasis la 3an kaj 4an de novembro 1986 en Netzschkau, distrikto Karl-Marx-Stadt. La malfermon, vespere la 3an de novembro, partoprenis i. a. la prezidanto de Kulturligo de la subdistrikta organizaĵo Reichenbach, k-do Böckel. Grupoj de junaj recitantoj prezentis mallongan kulturan programon. La saman vesperon kelkaj partoprenintoj prezentis diapozitivojn. La sekva tago, la 4a de novembro, estis programriĉa. Post konciza kaj prava prijuĝo de la internacia akutala situacio fare de Hans Heinel, prezidanto de GDREA, sekvis prelego de Detlev Blanke pri la aktualaj stato kaj problemoj de la esploro de la historio de GLEA. Sekvis tre abunda diskutado flanke de tiuj, kiuj per propraj agoj formis ĝuste tiun historion. Kiel kutime dum ĉi-tiaj tre viglaj renkontiĝoj ankaŭ ĉi-foje oni konatiĝis kun multaj novaj detaloj ankoraŭ nekonataj. Post la diskuto Hans Heinel resumis la ĉefajn rezultojn de la 71a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino. La posttagmezo estis dediĉita al ekskurso al celoj en la regiono Vogtland, i. a. al la mondfama teknika monumento, la Göltzschtalbrücke (fervojlinia ponto). Vespere la renkontiĝanoj povis rigardi esperantigitan sovetian filmon „Lecionoj de la historio". Sekvis lumbilda prelego pri Pekino fare de Detlev Blanke. La tuta renkontiĝo distingiĝis ne nur pro interesa programo sed ankaŭ pro la bonega etoso. Apartan laŭdon kaj dankon meritas la preparintoj Erich Würker el Reichenbach kaj Walter Petzold el Netzschkau. Ili tre zorge solvis ĉiujn teknikajn demandojn, i. a. preparis du montrofenestrojn per esperantajoj (funkciantaj dum 8 tagoj). La 10a renkontiĝo okazos 1987, dum la jubilea jaroj de Esperanot.

Geschenk zum Jubiläumsjahr: ein neues Büro

Das Sekretariat des Zentralvorstandes des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR erhielt im Jubiläumsjahr des Esperanto ein neues Büro. Die neuen hervorragenden räumlichen Bedingungen werden die Arbeit des Verbandes zweifelsohne positiv beeinflussen. Die alleinige Postadresse: Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, DDR—1080.
Das Büro selbst befindet sich in der Friedrichstraße 120, Berlin, 1040. Telefonnummer folgt.

Donaco okaze de la jubilea jaro: nova oficejo

La sekretariejo de la Centra Estraro de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA) komence de la jubilea jaro de Esperanto ricevis novan oficejon kun 6 ĉambroj. La novaj elstaraj ejaj kondiĉoj certe influos la laboron de la asocio pozitive.
La sola poŝta adreso: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, DDR—1080.
La oficejo mem troviĝas en: Friedrichstr. 120, Berlin, 1040. Telefonnumero sekvos.

El la vivo de GDREA

Esperanto-turistoj renkontiĝis

La Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro (ITRE) jam estas kelkjara tradicio. Laŭ interkonsento aranĝas ĝin alterne la Esperanto- grupoj de Schwarzenberg kaj Karlovy Vary, do ĉi-flanke kaj alia-flanke de la limo. Ĉi-jare, la naŭa aranĝo okazis en Antonsthal sub egido de la amikoj de Schwarzenberg. La kondiĉoj estis tre bonaj, la nivelo de la ripozdomo de paperfabriko, la programo, pejzaĝo kaj vetero. La partoprenantoj venis el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario kaj GDR. Ni migradis tra la bela aŭtune bunta montaro, konatiĝis kun vidindajoj de la okcidenta Ercmontaro, ĉefe kun restaĵoj de la iama mineksploatado, kiu dum jarcentoj stampis la vivon tie. La Ercmontaro historie ja estis la malriĉulejo de Germanio. Trovo de arĝenta erco kaj de aliaj mineraloj interrompis de tempo al tempo la jarcentan mizeron. La mineja epoko kaj konjunkturo finiĝis, sed sub socialismaj kondiĉoj la loĝantaro ne refalis en malriĉecon. Restis produktadbranĉoj bazantaj sur metalo. Kiel ekzemplo estu menciita la produktado de lavmaŝinoj, kiu konatigis la nomon Schwarzenberg en la tuta mondo. La iama vintra okupiĝo, lignoskulptado, produkto de ludiloj kaj puntoplektado, servantaj por transvivi, nun estas kreivaj hobioj kaj floras kiel aliaj specoj de popolarto. El iama malriĉa kaj malprogresinta regiono estiĝis multvizitataj turismaj centroj. Ni vizitis minejon, muzeojn de etŝpura fervojo kaj fero, arĝento-lavejon k. a. Dank al la klopodoj de la Esperanto-amikoj de Schwarzenberg, precipe kamarado Eichler kaj d-ro Werner, ITRE fariĝis modela evento.

Rudolf Hahlbohm

Porpaca JEPRE '86

De la 25a ĝis la 28a de septembro 1986 renkontiĝis en la junularhotelo Pöhl 48 gejunuloj el ČSSR, Pollando, GDR, Sovetunio kaj Hungario okaze de la 2a pacrenkontiĝo de junaj esperantistoj en la Ercmontaro, JEPRE 86. Dum sporto, ludado, danco kaj ekskursoj ni konatiĝis kune per helpo de nia internacia planlingvo Esperanto. Speciale ni junaj esperantistoj, kiuj vivis ĝis nun en paco kaj sukceso, ŝatas la pacon kiel gravegan posedon de la homaro. Sed en la UNO-„Jaro de la Paco" ne sufiĉas la konfeso al la paco. Pro tio ni protestas kontraŭ la astromilitaj intencoj de la Usona registaro kaj postulas la ĉesigon de la konkura armado sur nia bela tero kaj en la kosmo, por konservi la pacon kaj la feliĉon por niaj gefiloj. Helpe de Esperanto ni volas porti nian pacvolon en ĉiujn landojn kaj manpreni al ĉiuj pacamaj homoj. Per diligenta laboro kaj bonaj rezultoj en studado, aktiva kunlaboro en niaj Esperantomovadoj kaj en Mondpaca Esperantista Movado „MEM" ni fortigos niajn hejmlandojn kaj la mondvastan fronton de la batalantoj por paco kaj malarmado.

La partoprenintoj de JEPRE '86

Internacia feriado en la ĉefurbo

Ankaŭ ĉi-jare okazis tradicie la internacia Esperanto-feriado en la feria regiono de Berlin [31. 8. — 6. 8. 86]. La bone ekipitaj feriaj domoj de la kampadejo Krossinsee estis taŭga elirpunkto. La partoprenantoj el diversaj landoj vizitis muzeojn, konatiĝis kun la historia urbocentro, novaj kvartaloj, la ĉirkaŭajo, veturis per ŝipo kaj eksciis ion pri pasinteco kaj estonteco de la metropolo kaj pri Esperanto en GDR. Menciindaj stacioj estis i. a. Pergamon-Muzeo, Thälmann-Memorejo Ziegenhals, la Informcentro Berlin (kun filmo pri la urbo post la milito kaj nun), kaj renkontiĝo kun reprezentantoj de nova kvartalo. La antaŭtagmezo ĉiam servis al lingva perfektiĝo, la konversacio okazis sukcese sub la elprovita gvidado de d-ro Páva, Tiaj komunaj feriadoj en la medio de la internacia lingvo helpas perfektiĝi lingve, peras informigajn impresojn kaj ebligas prezenti la praktikan utilon de Esperanto, fine ili estas kontribuo al internacia kompreniĝo kaj firmigo de popola amikeco.

Rudolf Hahlbohm

SEFT 1986

La jam 9a aranĝo en la serio de la Someraj Esperantistaj Familiaj Tendaroj, SEFT '86, okazis en la tempo de 16. — 23. 8. 86 sur la kampadejo Thomsdorf ĉe Feldberg (Neustrelitz). Ĉi-foje partoprenis 90 esperantistoj el 6 landoj.
SEFT '87 kompreneble ankaŭ okazos, nome de 15. — 22. aŭgusto 1987. Informojn donas Werner Pfennig, Leibnizstr. 5/67, Neubrandenburg 2000.

3a Turingia esperantista junulara renkontiĝo

Ĝi okazis de 3. — 6. 10. 1986 en Weimar okaze de la Internacia Jaro de la Paco. Gravan rolon en la diskutoj ludis la laboro por Mondpaca Esperantista Movado. La partoprenintoj vizitis la Nacian Memorejon Buchenwald, pri kiu ekzistas esperantlingva broŝuro, la Goethe-muzeon kaj la nacian teatron en Weimar. Ne mankis moderna muzikvespero.

Junulara seminario en Lychen

La ĉiujare unufoje okazanta seminario por junaj aktivuloj de GDREA okazis 1986 de la 12a ĝis 17a de oktobro en Lychen. Prelegis Detlef Kraus, Andreas Penk, Torsten Lemke kaj d-ro Detlev Blanke. Kursojn gvidis Rainer Valtin kaj Jürgen Neuber.

16a plenkunsido de la CE de GDREA

La 16a plenkunsido de la Centra Estraro de GDREA okazis la 25an de oktobro 1986 en Falkensee. La prezidanto Hans Heinel donis koncizan superrigardon pri la ĉefaj internaciaj eventoj. Sekvis raportoj pri la 71a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino kaj pri aliaj internaciaj aranĝoj. La membroj de la Centra Estraro krome akceptis sian laborplanon por 1987. La kunsidon partoprenis la 1a sekretario de Kulturligo, distrikto Potsdam, k-do Wolfgang Wätzold.

Unua konsultiĝo de ĉefredaktoroj de E-revuoj el socialismaj landoj

En la urboj Vraca kaj Bjala Slatina, Bulgario, okazis de la 25-a ĝis 27-a de majo 1986 la unua konsultiĝo de ĉefredaktoroj, redaktoroj kaj kunlaborantoj de E-revuoj el socialismaj landoj. La aranĝon partoprenis la ĉeferdaktoroj de „Paco", „Tutmonda jurnalisto", „Bulgara esperantisto", „Interligilo", „Internacia agrikultura bulteno", „Esperanto informo", „Budapeŝta informilo" kaj „Pola esperantisto". Komisiite de nia estraro, mi partoprenis kiel reprezentanto de „der esperantist".

Pliaj partoprenantoj estis la prezidanto de BEA, Ĥristo Gorov, la honora prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev, la ĝenerala sekretario de MEM, Clement Tholet el Belgio, la vicprezidanto de „Monda turismo", Nikola Nikolov, kaj aliaj.

La celo de la konsultiĝo estis spertointerŝanĝo pri la agado de la diversaj redakcioj kaj precipe la demando, kiel plifortigi la komunajn potencojn en la mondvasta batalo por paco kaj malarmado.

Post la malfermo de la renkontiĝo flanke de k-do Gorov la konata heroo de la socialisma laboro de Bulgario, k-do Aleksiev, prelegis pri la temo „La internaciismo de Ĥristo Botev kaj la nuntempo". En tio li raportis pri la vivo kaj agado de la bulgara poeto, ĵurnalisto kaj gvida batalanto de la bulgara popolo kontraŭ turka jugo. Li postulis, ke la jurnalistoj de nia gazetaro batalu por paco kun la sama konsekvenco, kiel Ĥr. Botev tiam faris.

Poste sekvis vigla kaj interesa interŝanĝo de opinioj de la partoprenantoj, en kiu ĉiuj esprimis la komunan volon, unuigi la fortojn en la pacbatalo por savi la vivon sur la tero. La partoprenantoj raportis, kiamaniere la redakcioj strebas, daŭre plibonigi la enhavon kaj la grafikan aspekton de la eldonajoj kaj eble plej bone informi kaj instigi la legantaron por pacbatalo. Ankaŭ la eblecoj de multflanka kunlaboro inter la redakcioj estis vaste pridiskutitaj.

Ne estas eble, priskribi ĉi-tie ĉiujn klarigojn kaj proponojn en la interesa diskuto, sed ĝenerale oni povas konstati, ke tiu unua konsultiĝo kiel nova formo de kunlaboro estis sukcesa. Konsekvence ni interkonsentis, estonte regule aranĝi tiajn renkontiĝojn.

La konata bulgara gastemo dum nia restado estis modela. Samtempe okazis en Vraca la ĉiujara nacia kulturfesto „Botevtagoj 86", kaj ni havis la eblecon ĉeesti la recital-konkurson de Botev-poezio, viziti la Botev-memorajon en Balkano, la historian muzeon kaj artgalerion en Vraca, la naskiĝdom-muzeojn de la poeto Ĥrelkov kaj de Trifon Ĥristovski kaj aŭdi bonegan arĉinstrumentan kvarteton en la nova kaj moderna kulturdomo en Bjala Slatina.

Plenaj de multaj impresoj, pliriĉigitaj pere de la sperto-interŝanĝo kaj kun novaj kontaktoj ni hejmenveturis, sciante, ke la komuna agado de niaj redakcioj signifas novan peceton sur la vojo al paco kaj interkompreniĝo.

Manfred Arnold

La kvaran fojon — IMS

Dum la ILEI-konferenco 1981 en Gödöllö/Hungario estis akceptita la propono, regule okazigi seminariojn, kiuj koncentriĝos je problemoj de la instruado de fremdaj lingvoj kun speciala atento pri Esperanto. En Pollando okazis la unuaj du ĉi-specaj seminarioj, la tria en GDR (1985) kaj la kvara nun en Gárdony/Hungario ekde la 28-a de septembro ĝis la 4-a de oktobro 1986.

La ĉefa temo de la 4-a IMS (= Internacia Metodika Seminario) estis „Instruhelpiloj"; ĉiuj kontribuintoj strikte tenis sin je tiu-ĉi antaŭplanita linio. Ĉeestis ĉirkaŭ 50 personoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, FRG, GDR, Hungario, Italio, Pollando kaj Sovetio. La Instrua Komitato de HEA en kunlaboro kun la Hungara Instruista Sindikato patronis la aranĝajon, ili sukcesplene preparis kaj realigis ĉiujn programerojn enhave kaj organize.

La plej gravaj kontribuajoj titolis „Kion signifas demostrado en didaktiko" (d-ro I. Szerdahelyi), „Demonstrilaro de la Cseh-metodo" (E. Farkas-Tatár), „Metodoj de paroligo de lernantoj" (P. Jodasová), „Ĉiutagaj ŝablonaj konversaciajoj" (G. Sándor), „Instruhoro kun aŭdvida kasedo" (Z. Barcsay), „Enciklopediaj tabuloj" (K. Velösy), „Rolo de komputilo en la instruado de fremdaj lingvoj" (I. Koutny), „Bild- kaj sonmaterialo de lingvoorientiga instruado en 3—4 klasoj de elementa lernejo" (H. Behrmann). El GDR estas prezentitaj du kontribuoj kun la temoj „Pedagogia valoro de literatura-lingva komparado" kaj „Solvojproponoj je diferenciga lingvoinstruado".

Kelkaj komunaj konkludoj:

— Pli kaj pli evidentiĝas, ke Esperanto-instruado nepre estas envicigenda en la gamon de la ĝenerala fremdlingvo-instruado.
— La Esperanto-instruado bezonas speciale profundan preparon flanke de la kursestroj, ĉar la relative rapida lernprogreso postulas enhavan pliriĉigon de la unuopaj instruhoroj.
— La kunlaboro kun metodologoj kaj instruistoj de etnaj fremdaj lingvoj estu plivastigota, por ke la jam akiritaj spertoj surkampe de la instruado de la planlingvo kaj de la etnaj lingvoj alportu duoblan pozitivan rikolton.
— La kvina IMS okazos en Bulgario, printempe 1987, kaj estos dediĉita al la temo „La instruhoro".
— La oficiala organo de ILEI „Internacia Pedagogia Revuo" pretas publikigi kontribuojn, kiuj estis prezentitaj dum la unuopaj seminarioj kaj estis trovintaj bonan efon.

Ankoraŭfoje koran dankon al la supre menciitaj organizintoj, al niaj gekolegoj hungaraj!

d-ro T. Dahlenburg

Jugend-Wochenendseminar in Köthen

In Köthen findet vom 29. — 31. Mai 1987 ein Jugendseminar statt. Die Veranstaltung umfaßt Sprachkurse für Anfänger und Fortgeschrittene. Für Übernachtung, Verpflegung und die Lektoren wird ein Beitrag von voraussichtlich 25 — 30 M erhoben. Anfragen und Anmeldungen an B. Kuse, Straße der Thälmannpioniere 53, Köthen 4370.

Hungaraj Esperanto-aranĝoj 1987

Pri la Esperanto-aranĝoj okazontaj 1987 en Hungario informos vin: Esperanto-Sekcio de Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo EXPRESS, Budapest V, Szabadság tér 16, 1395.

Esperanto-aranĝoj en urbo Vraca (Bulgario) dum 1987

29an de majo — 3an de junio 1987

7a Internacia Konkurso-Recitalo pri Botev kaj bulgara poezio en Esperanto

Tiu jam tradicia aranĝo okazos enkadre de la Naciaj Kulturaj Festoj „Botev-tagoj '87", dediĉitaj al la 111a datreveno de la heroa pereo de la fama poeto Hristo Botev — simbolo de la bulgara libereco kaj literaturo.

La programo inkluzivos ankoraŭ grotan koncerton, 10-kilometran piedmarŝadon, renkontiĝon kun la loka esperantistaro kaj partoprenon en la oficialaj solenaĵoj de „Botev-tagoj '87".

16an de oktobro — 20an de oktobro 1987

Internacia Konferenco „Esperanto en la profesio" kaj
Dua Internacia Scienca Esperanto-Seminario pri Kosmaj Esploroj
La unua aranĝo klarigos la aspektojn kaj la problemojn de la uzo de Esperanto en la profesia agado, kaj la dua montros, kiel nia, jam centraja lingvo povus esti uzata en la laboro de la sciencistoj pri kosmaj esploroj. En la aranĝoj eblos ankaŭ koresponda partopreno.
La programo inkluzivos ankoraŭ renkontiĝon kun la loka esperantistaro, ekskurson al la groto „Ledenika", viziton de la astronomia observatorio en urbo Belogradĉik kaj viziton de la ĉefrubo Sofio. Korespondadreso: Esperanto, p. k. 66, BG-3000 Vraca, Bulgario
Ĉiu aliĝanto ricevos de la organizantoj oficialan invitilon kaj pluajn informojn.

Pri Renn kaj „Popola Fronto" en „Neues Deutschland" kaj ... pri „Kunstsprache"

En la gazeto „Neues Deutschland" 20./21. 9. 1986 aperis artikolo de Detlev Blanke pri la partopreno de laboristaj esperantistoj en la batalo kontraŭ generalo Franco (elp. Franko). Oni ankaŭ presis la manskribitan saluton de Ludwig Renn por la gazeto „Popola Fronto". La redakcio iom ŝanĝis la originalan artikolon kaj klopodis aldoni iujn informojn pri Esperanto mem. Tio estas sendube pozitiva paŝo. Bedaŭrinde ĝi uzis sen scio de la aŭtoro la esprimon „Kunstsprache" (artefarita lingvo). Necesas informi pri tio, ĉar D. Blanke kompreneble ne uzas tiun esprimon por Esperanto sed aplikas la interlingvistikan terminon „planlingvo" (Plansprache).

24a Pola Esperanto-Kongreso

Ĝi okazis de 23a ĝis 29a de aŭgusto 1986 en Krakow. Kiel oficiala reprezentanto de GDREA partoprenis Achim Zettier. La kongreson (pli bone: kultura festivalo) partoprenis 517 esperantistoj, inter ili 23 eksterlandanoj el 7 landoj.

Kurso en politeknika supera lernejo

Esperanto-kurso aktuale okazas en la Mandela-lernejo en Ilmenau, sub gvido de d-ro Hans Rogaszewski.

5 belaj koloraj gratulkartoj

La (i. a.) grafikisto de GDREA Joachim Schulze el Leipzig produktis 4 tre belajn gratulkartojn kun jenaj surskriboj:

1. „Okaze de ĝoja evento la plej bonajn dezirojn",
2. „Koregajn bondezirojn okaze de via naskiĝtago",
3. „Skribu baldaŭ! Mi atendas vian respondon!"
4. „Korajn salutojn el Leipzig" (kun la IFER-konstruaĵo).

La 5a oferto estas originale amuza gratulkarto „Feliĉan Novjaron" (la raketo „Saksa Kuriero" sur sciencficsia Esperanta stelo en la kosmo). La kartoj, po 0,20 markoj estas mendeblaj ĉe Urba Estraro de GDREA en Kulturligo de GDR, PSF 713, Leipzig, 7010. Mendu, ili valoras tion!

D-ro Krause: akademiano

Okaze de la elektoj por la Akademio de Esperanto, elektiĝis ankaŭ d-ro Erich-Dieter Krause el Leipzig. D-ro Krause estas membro de la Centra Estraro de GDREA kaj aŭtoris la vortarojn Esperanto-Germana, Germana-Esperanto (poŝvortaroj) kaj la granda Germana-Esperanto.

Jiři Kořinek — 80jara

La konata ĉeĥa Esperanta poeto Jiři Kořinek festis sian 80an naskiĝtagon la 1an de oktobro 1986. Al la multnombraj gratuloj aliĝas ankaŭ liaj amikoj el GDR.

Ni kore gratulas al

— Linde Knöschke, membro de la CE de GDREA, pro ronda naskiĝtago. Ŝi krome ricevis la 1an de novembro 1986 la Johannes-R.-Becher-Medalon en bronzo.
— Alfred Müller, iama membro de GLEA el Karl-Marx-Stadt, kiu fariĝis 80jara la 21an de novembro 1986.

Ni funebras pro

— la forpaso de Felix Klötzer el Withen, la 28an de junio 1986,
— Franz Bayer, kiu mortis 81jara la 17an de septembro 1986 en Dretzschen (ĉe Bautzen) kaj multe laboris por Esperanto en la soraba regiono de GDR.

Forpasis Béla Berceli (1905 — 1986)

La konata personeco de la hungara kaj tutmonda Esperanto-movado, la iama ĉefsekretario de HEA (1965 — 1974), Béla Berceli, mortis la 5an de septembro 1986. Li laboris pli ol 60 jarojn en la Esperanto-movado kaj fondis kune kun sia frato Vilmos Bleier la Hungaran Esperantistan Socieon Laboristan. Béla Berceli estis tre bone amiko de la esperantistoj de GDR kaj eminente kontribuis por la pliprofundigo de la kunlaboro de la Esperanto-asocioj de socialismaj landoj. La unua Konsultiĝo dum la jaro 1969 estis inspirita de li. Ni gardos honoran memoron.

Aldono pri „Deklaracio pri la Rajto de la Popoloj je Paco"

La supre menciitan deklaracion ni publikigis en esperanta traduko en „der esperantist" 5/86, p. 97. Mankas indiko pri la akceptinta organizajo. Devas taksti komplete: La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj aprobis ...
Ni pardonpetas pro la misajo. **La red.**

Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!

Bulgario

34j. orajisto en ŝtata ateliero dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, geografio, psikologio, fotografio; kol. bk: Russy Vasilev, **8900 Nova Zagora,** str. Atanas Dimitrov 6

Marieta Nikolova Atanasova, **3600 Lom,** distr. Mihajlovgradski, str. „Stefan Karaĝa" N 20, A/31 et. 4, (18 j.) dez. kor. pri historio, literaturo, arto; kol. bk insignojn, kalendaretojn

Komencantino dez. kor. tutmonde: Loia Tanceva, **2030 Kostenec,** Sofia-distr., str. Iskra 6.

Arbar-inĝeniero, 42j., dez. kor. kun gekolegoj pri vojaĝoj, kulturaj temoj: Velĉo Velĉev, str. V. Aprilov 1, bl. Edelvais, **7300 Kubrat**

Ĉeĥoslovakio

Alena k. Jaromir Veverka, Beloveská 1672, 547 01 Náchod, 33 k, 35j., dez. kor. kun bredistoj de hundoj, raso Chow Chow.

60j. pensiulo dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, mapojn, urboplanojn, spritajojn: Ladi Král, Česká Kubice 77, 344 00 Domažlice

GDR

Ekonomisto, 36j., dez. kor. pri literaturo, matematiko, politiko: Jürgen Pohle, Zollstr. 7/106, Magdeburg 3029

Angela Rieck, Str. der Jugend 32, Rheinsberg 1955, dez. kor. tutmonde pri E-movado, fremdlingvoj, literaturo, bestbredado, bestpsikologio

Dorothea Kaiser, Wenzelstr. 12, Altenburg 7400, dez. kor., kol. bk

Frieda Gabel, F. 42, Gallm, Kreis Lübz 2861, dez. kor. kun virinoj el Francio, Hispanio kaj Britio

Instruisto, 62j., dez. kor. pri reciproka gastigado, kol. bk: Gerhard Hornbogen, Am Schönblick 11/31, 5300 Weimar

Hungario

17j. lernanto dez. kor. kun gejunuloj pri muziko, historio, kol. pm: László Szuromi, 3300 Eger, Rákoczi ut. 54.8/26

Pollando

Komencanto, 32j. laboristo, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, pm: Jan Arendarcyk, Plac Wolności 13/3, 58-420 Lubowka

Komencantino, 30j. oficistino, dez. kor. tutmonde pri filmo, muziko, turismo, modo, fotoarto: Ewa Heinrich, ul. 1 Maja 25/1, 58-100 Swidnica

23j. laboristino (komencantino) dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, historio, kol. bk, prospektojn: Dorota Maczka, ul. Mlynarska 22/28, 08-110 Siedlice

Komencantino, 27j. laboristino, dez. kor. tutmonde pri turismo, lingvoj: Maria Zietek, 05-800 Pruszków, ul. Chopina 25 m 5

18j. junulio dez. kor. pri junulara muziko: Dorota Pakosz, ul. Dworcowa 49, 47-217 Raszowa k/Koźla, woj. Opolskie

31j. instruistino dez. kor. pri societo, filmoj, libroj: Mavica Dnoal, ul. Sikorskiego 41, 58-100 Swidnica

Komencantino, 20. studentino, dez. kor. tutmonde pri sporto, turismo, muziko, kol. turism, prosp. k. il. revuojn: Jolanta Jacek, 34-500 Zakopane, str. Modrcejewskiej 5

Rumanio

Lernantino, 15j., dez. kor. p. ĉ. t.: Szöke László, Tihador 5, ap. 13, 4150 Odorheiu-Sec. jud. Hargitha

Komencanto, 15j. dez. kor. tutmonde: Gyula Vass, 4150 Odorheiu-Secuiesc, Independentei 36, ap. 10, Jud. Hargitha

Vjetnamio

Dez. kor. Vú Quôć Chińh, 414/1544 Diên Bhiên Phú Street, 1 th. District, Hô-Chi-Minh-Town.

Soveta Unio

17j. bindistino dez. kor. pri historio, kulturo, muziko, pentroarto: Nadejda Krivoŝta, 340 007 Doneck, ul. Buslaeva 21, kv. 6

25j. komencantino dez. kor. pri filmoj literaturo, pentroarto, tekniko: Olga Lednej, ul. Pavlodarskaja 10, kv. 79, 340 005 Doneck

18j. studentino dez. kor. pri fotografado, rajdarto: Viktorija Maslova, ul. Dneprozerĵinskaja 14, kv. 40, 340 016 Doneck

19j. studentino dez. kor. pri sporto, foto, pentroarto, kol. kalendaretojn: Tanja Ŝpakova, pr. Buslaeva 31, kv. 21, 340 007 Doneck

Du studentinoj, 19j., dez. kor. pri pentrado, fiziko, matematiko, fotografado, komputado: Lena kaj Iarisa Prokopenko, pr. Buslaeva 33, kv. 24, 340 007 Doneck

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16